

EL POPOLA ĈINIO

V-19034

Esperanto



Mar.
1953



Funebro pri Nia Granda Instruisto kaj Plej Estimata kaj Amata Amiko Kamarado J. V. Stalin

La granda gvidanto kaj genia instruisto de la tutmonda laboranta popolo, kamarado J. V. Stalin forpasis je la 5a de marto, 1953. Aŭdinte ĉi tiun malfeliĝegan novaĵon, la tuta ĉina popolo droniĝis en profunda funebro.

Eksterordinara zorgo plenis la koron de la ĉina popolo tuj kiam publikiĝis el Moskvo la komuniko pri la malsaniĝo de kamarado J. V. Stalin. Unuj post aliaj sin turnis al ĵurnalejoj kaj radiostacioj por informiĝi pri lia sanstato. Sed, antaŭtagmeze de la sesa, subite disaŭdiĝis la malfeliĝega deklaro pri lia forpaso, kiu tiel surprizis la ĉinan popolon, ke ĝi apenaŭ povis kredi al ĝi. Multaj eklarmis starante antaŭ la radiaparatoj. Interrompiĝis la prezentaĵoj de filmoj kaj teatraĵoj. La tuta ĉina popolo funebriis kun profunda doloro la forpason de sia granda instruisto, plej estimata kaj plej amata amiko. Prezidanto Maŭ kune kun aliaj gvidantoj de la Centra Popola Registaro tuj vizitis la Sovetian Ambasadorejon en Pekino por kondolenci. La Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio, la Landa Komitato de la Politika Konsiliĝa Konferenco de Ĉina Popolo kaj diversaj popolaj organizoj telegrafis al Moskvo por esprimi sian profundan funebro. Preparado por grandioza funebra ceremonio estas farata ĉiuloke tra tuta Ĉinio.

Kiam la malfeliĉa informo nin atingis, tiu ĉi numero estis jam preskaŭ finpresita, tial ni povos detale raporti pri la funebrado tra tuta Ĉinio nur en la venonta numero.—la Red.

La Granda Muro Subtera

— Pilgrimo sur Korea Fronto —

La Apero de Tuneloj

De kiam la aŭtuna ofensivo de Van Fleet en 1951 estis frakasita, la korea kaj ĉina popolaj trupoj, per senkompara energio, mirinda sagaco kaj sinforgesa laboremo, kavigis kaj tratruis dum pli ol unu jaro sen-nombrajn montojn sur la korea fronto, kreante miraklon senprecedencan en la monda milita historio—defend-liniojn nedetruiblajn kaj tunelo-fortikajojn neruinigeblajn.

La skalo de la tunelo-konstruado estas malfacile klarigebla per ciferoj. Mi prezentu nur unu ekzemplon: Per la tero kaj ŝtono elfosita en la konstruado de tuneloj fare de iu trupo da ĉinaj volontuloj oni povus konstrui muregon ses metrojn altan kaj tri metrojn larĝan laŭlonge de la 38-paralelo. Kaj tio estas nur tre malgranda parto de la tuta laboro de tunelo-konstruado.

En la fosado de tunelo ni ne havis ekskavatorojn, bor-esplorilojn kaj tiel plu, sed ni havis altgradan aktivecon kaj kreemon kaj spiriton por venki malfacilojn. Ĉe ni estis nur simplaj instrumentoj kiel marteloj kaj fosiloj, tamen dank' al sia studado niaj batalantoj solvis serion da komplikaj teknikaj problemoj, kiujn la sapeistoj de kiu ajn trupo en la mondo neniam renkontis kaj solvis. Inter la ĉinaj volontuloj troviĝis multe da kompetentuloj—ŝtonistoj el Junnan-provinco, ĉarpentistoj el Kuejĉoŭ-provinco, ministoj el Ŝansi-provinco ktp. Ili alportis semojn de tekniko kiujn oni dissemis inter la amasoj. Pere de kolektiva studado oni kreis diversajn instrumentojn. Per tiuj instrumentoj ili povis plani kiel eviti fontojn kaj kiel renkontigi precize du tunelojn ĉe iu punkto en la monto, kiujn oni fosis de du malsamaj direktoj. Montotrafosaj herooj en tre mallonga tempo ekmastris la ecojn de la ŝtonoj. En Koreio ekzistas plej malmola speco de ŝtono, kiun oni povis enbori nur centimetron profunden per tri cent batoj de martelo. Sed antaŭ la sagacaj kaj heroaj ĉinaj volontuloj kun supera tekniko tiu speco de ŝtono fariĝis tiel manipulebla kiel koto.

Dum la pasinta pli ol unu jaro, kiam la neĝo printempa ekdegelis aŭ someraj foliriĉaj arboj ĵetis siajn ombrojn sur la tero, inter la montoj sur la fronto bruis senĉesa tintado de la marteloj kaj eksplodado de dinamito. Tage aŭ nokte sur, en aŭ sub la montoj ĉiam aŭdiĝis gajaj kaj heroaj kantoj de la montatankantaj herooj. Aŭdiĝis kanto en tiu ĉi flanko:

Martelojn alte svingante kaj borilojn firme tenante,

Ĉinaj volontuloj kontraŭ monto atakas.
Batas la marteloj kaj ŝprucas la fajreroj,
Montojn tremigante la eksplodoj krakas.

Respondis kanto en la alia flanko:

Ol la herouloj monto ne pli altas.
Ol la volontuloj ŝtono ne pli hardas.
Monton post monto ni kavigos kaj tratruos,
Grandan Muron subteran preta ni konstruos.

Tiam sekvis alia kanto:

Monto ĉenas kun monto kaj tunelo kun tunel',
Granda Mur' sub la tero pli malmolas ol la fer'.
'Aerŝpruca' vagas blinde, B-29 zumas sen cel',
Unu hom' defendas, cent atakas sen esper'.

Nur dum pli ol unu jaro, densaj kiel araneaj retoj kunplektiĝis tuneloj kaj komuniktrancoj en montaroj sur la frontoj tra la korea duoninsulo, formante la plej fortan defend-linion senprecedencan en la milita historio de la mondo. La batalantoj diris kun fiero: "Tiu ĉi estas 'Granda Muro Subtera', per kiu ni defendas la patrion kaj mondpacon."


La Funkcio de la Tuneloj en Batalo

La Usonaj invadantoj sin apogis sur sia abundeco de ŝtalo, sed la "supereco" en tiu ĉi flanko grandparte malaperis post kiam ĉe nia armeo konstruiĝis la subteraj tuneloj.

Antaŭtagmeze de la 14a de oktobro, 1952,—la unua tago de la batalo de Sangkumrjung—la malamikoj pafis pli ol cent mil obusojn kontraŭ du montpintoj de Sangkumrjung. Post la eksplodo de ĉi tiuj obusoj sur la montpintoj, la komandanto de nia armeo demandis telefone kiom da perdoj ni suferis. La batalantoj en la tunelo respondis: "Kiam la malamikoj ekbombardis, intendanto de la bataliona stabo kuris en la tunelon kaj forlasis sian ĉapon ekstere. Nur ĉi tiu ĉapo dispeciĝis kaj nenio pli." Van Fleet detruis unu ĉapon per pli ol cent mil obusoj kaj tio estis lia "milita atingo". Post la bombardo sekvis atako de la malamika infanterio al la monto. Refreŝigitaj kaj tute pretiĝintaj la ĉinaj volontuloj rapide elkuris sur la montpintojn kaj pelis malsupren la infanterion de la malamikoj.

Post kiam la malamikoj multon pagis, ili provizore okupis la montpintojn. La ĉinaj volontuloj transiĝis en la tunelojn por kontraŭbatali kaj tuj raportis tion al nia artilerio per radio. Post palpebrumo eksplodis salvo post salvo da obusoj de nia armeo sur la montpintoj. Kvankam la ĉinaj volontuloj kaj la malamikoj troviĝis en la sama monto, tamen la ĉinaj volontuloj estis en la mont-ventro sin kaŝantaj profunde en la tuneloj dum la malamikoj ekspoziciĝis sur la montsupraĵo. Tial niaj obusoj kvazaŭ kun okuloj, trafis nur la malamikojn, kaj ni mem ricevis neniun vundon. Post kelkaj sinsekvaj salvoj la surmontiĝinta bataliono malamika estis preskaŭ tute ekstermita. Kun la helpo de alsenditaj frataj trupoj la ĉinaj volontuloj en la tuneloj forbatis la malamikojn kaj reprenis la pozicion.

Dum ripetaj bataloj por la montpintoj la malamikoj sin trudis sur la montojn, sed ili ne povis firmstari tie, ĉar niaj trupoj en la tuneloj povis rompi ilian vertebraron en ajna tempo. La malamikoj ĉiel klopodis detruiri niajn tunelojn. Ili klopodis bruligi per flandisŝprucigiloj, fumataki per sulfuro-bomboj kaj ĵeti grenadojn kaj dinamitpaketojn en la tunelojn. Sed antaŭ ol ekfari ian malutilon la plejmulto el la malamikoj estis jam pafmortigitaj de ĉinaj volontuloj gardarantaj ĉe la tunel-elirejoj.



Volontuloj aŭskultas muzikon kaj novaĵojn el la patrolando en unu el siaj subteraj kluboj.

Vivo de la Batalantoj en la Tuneloj

Post finkonstruo de la tuneloj, la vivo de la batalantoj en la fronto ankaŭ multe ŝanĝiĝis. Estas malfacile imagineble por homoj postfrontaj ke niaj batalantoj povas kuiri kaj manĝi vermicelon kaj eĉ rigardi filmon nur kelkcent metrojn for de la malamikoj.

Iumatene mi iris al la pozicio de iu fronta subpelotono. Kiam mi eniris la tian tunelon, Kamarado Kuo Fu-tian, estro de maŝinpafista subpelotono, estis boliganta akvon por kuiri manĝaĵojn. Post iom da tempo gardestaranto venis raporti, ke sub la kovro de matena nebulo la malamikoj komencis atakon. La batalantoj en la tunelo tuj elkuris kun armiloj. Aplombe almetinte du pecojn da ligno

Centoj da strataj komitatoj en ĉiu urbo de nova Ĉinio estas ekzemploj de radika demokratio bone funkcianta. Ili estas la instrumentoj, per kiuj la popolo aranĝas siajn aferojn kaj solvas la komunajn problemojn, kiaj pri bonstato, sano kaj sekuro. Ĝenerale konsistante el 7-10 etaj grupoj, la komitatoj estas ordinare formitaj el 20-30 familioj, tiel ke ĉiu familio povas partopreni rekte en la laboro de memregado. La komitatoj ankaŭ servas kiel unu el la bazaj elektaj unuoj por elekti membrojn de la konferencoj de popolaj reprezentantoj, kaj ludas gravan rolon en efektiviĝo de elektado kaj en administrado de la urbaj aferoj.

En mia urbo de Suĉoŭ, ĉirkaŭ 45 mejlojn okcidente de Ŝanhajo, la disvolviĝo de popolaj demokratiaj organizaĵoj depost liberiĝo estas fenomenaj—sindikatoj, kamparanaj asocioj, virinaj federacioj, junularaj organizaĵoj, strataj komitatoj kaj konferencoj de popolaj reprezentantoj, ĉiuj fariĝas parto de la politika vivo de la popolo.

Depost la fondiĝo de la strataj komitatoj frue en 1951, la tuta politika kaj socia perspektivo de la urbanoj ŝanĝiĝis. La komitato por mia strato, mi kredas, estas tipa ekzemplo. Nia strata komitato, ĉe la komenco, konsistis nur el 20 laboristoj, posedantoj de etaj varbudoj, kolportistoj, kiuj plejparte estis sen laboro. Kunvenoj okazis du-foje en ĉiu semajno por diskuti la disvolviĝon de organiza laboro inter la loĝantoj kaj por mobilizi ilin solvi gravajn problemojn.

Kiam membroj multiĝis, estis fonditaj vespera lernejo kaj ĵurnaloleganta grupo, por ke la analfabetoj lernu legi kaj skribi, kaj la kleruloj studu registarajn politikojn kaj konigu al si la nacian kaj internacian situacion. Oni starigis murgazeton ĉe la plej videbla loko en la strato.

Ĉiuj tiuj unuaj klopodoj multe helpis vekti la politikan kaj socian konscion de la loĝantoj de nia strato.

Kiel la popolo administras urbon

Demokratio

En aŭgusto de 1951, nia strata komitato aliĝis al la interstrata komitato, kiu konsistas el 13 aliaj strataj kaj stratetaj komitatoj. La ĉefa celo estis ebligi ĉiun komitaton studi la progreson faritan de la aliaj, interŝanĝi spertojn kaj doni proponojn kaj konsilojn al la distrikta konferenco de popolaj reprezentantoj. Ĉar mi ofte skribis ion por ĵurnaloj kaj gazetoj, oni elektis min ĉefo de la publikiga sekcio de la studa grupo kaj ankaŭ korespondanto por la interstrata komitato.

La elektado de reprezentantoj al la Kvara Konferenco de Popolaj Reprezentantoj okazis en septembro, 1951. La tuta procedo estas ekzemplo de demokratio funkcianta de malsupre supren, kaj ĝi konsistas el diversaj elektadoj komence de la strataj komitatoj, kiuj servas kiel la bazaj elektaj unuoj kune kun fabrikoj, lernejoj kaj aliaj organizaĵoj.

Multe da antaŭ-elekta diskutado okazis en la tutstrata popola konferenco, post kiu ni faris nian elekton. Antaŭ la baloto la voĉdonantoj dividiĝis en kelkajn grupojn kaj partoprenis en detala diskutado pri la kandidatoj, kiujn ili volis elekti por la subdistrikta elekto.

Kvin nomitoj estis fine proponitaj kaj unuanime akceptitaj de la voĉdonantoj; ĉiu plenaĝulo de la strato, escepte de krimuloj kaj kondamnitaj kontraŭ-revoluciuloj, rajtas voĉdoni. La nomitoj sekve raportis al la voĉdonantoj ĉiujn rilatajn faktojn pri siaj kapablo, klereco, socia pozicio kaj persona historio. Poste, ĉiu voĉdonanto devis skribi po tri nomoj kaj meti ilin en la balotan keston. Tiuj, kiuj ne povis skribi ĉinajn ideografojn, uzis arabajn numerojn por montri sian elekton.

sub la kaldronon, Kuo Futian sin jetis ekster la tunelon kun maŝinpafilo antaŭlonge ŝargita. Brubruis pafiloj ekster la tunelo. La maŝinpafilo de Kuo Fu-tian ankaŭ sonis "ta... ta... ta...". Tiam la lignopecoj sub la kaldrono en la tunelo estis arde brulantaj kaj la flamoj jen kaj jen lekadis la kaldron-fundon. Post momento la malamikojn oni venkis. Kamarado Kuo Fu-tian envenis kun sia maŝinpafilo. La akvo en la kaldrono jam ekbolis. Demetinte la maŝinpafilon li prenis vermicelon, ĝin kuiris en la kaldrono kaj nin regalis per matenmanĝo. Turnante mian rigardon mi vidis la litojn de niaj batalantoj. En ambaŭ flankoj de la longega tunelo troviĝis vicoj da ĉeloj kun malgranda interspaco. La ĉeloj estis kovritaj ĉiuflanke per oletolaĵo por ŝirmi ilin kontraŭ defalebla tero. La litkovriloj estis aranĝitaj en bona ordo kaj sur la litoj sterniĝas dika tavolo da pajlo kaj varmaj litkovriloj. Jen kiel vivas niaj batalantoj de la fronta subpelotono.

Mi ankaŭ rigardis filmon en tunelo ĉe la fronto. Tiu tunelo estis pli larĝa kaj ĉe unu ekstremo de iu pli rekta parto ekrano pendis de stango dum ĉe la alia ekstremo lokiĝis projekciilo. Interspace estis metitaj ligno-stangoj kiuj servis kiel seĝoj. Ĉiufoje la rigardantaro nombris kelkcent. La batalantoj revenintaj

triumfe kun pulvo-odoro tutkorpe eksidis en la "kinejo" ĉe la fronto por rigardi la filmon, apenaŭ havante tempon por viŝi ŝviton. Ĉiufoje oni prezentis "Ordinara Soldato"-n. Kiam la heroo figuro de Matrosov aperis sur la ekrano, la batalantoj estis instigitaj al aklamado kaj manklakado. Ili forgesis sian laciĝon kaj lasis sian animon tute absorbita de la Sovetia heroo.

Post demando al la rotestro mi eksciis, ke ĉi tiu "kinejo" estis nur 500 metrojn for de la malamikoj. Dum ni rigardis la filmon, la malamikoj ankoraŭ daŭrigis sian bombardon al ĉi tiu montpinto.

—Tradukis Sunkaj—

Popolaj organizoj ne sin limigas en strataj komitatoj kaj konferenco de popolaj reprezentantoj. La loka Demokrata Virina Federacio speciale dediĉas grandan atenton al la nuligo de analfabetoj inter strataj loĝantoj kaj la plibonigo de laborkondiĉoj por laboristinoj kaj plibonigo de la kondiĉoj por la sano de patrinoj kaj infanoj.

La filio de la Novdemokratia Junula Ligo en Suĉoŭ ne postrestis. Sub ĝia iniciato, oftaj diskutoforumoj okazis por altigi la kulturen nivelon de membroj kaj nemembraj partoprenantoj. Krom la librotendado- kaj kontado-institucioj, la klerigaj klasoj kaj la vesperaj lernejoj de la Ligo donis al miloj la ŝancon studi kurantajn aferojn kaj elementajn socisciencajn kursojn. La ĉiam plikreskanta membraro kaj populareco de la Ligo elmonstras, ke la popolo soifas pri scio.

Junglofang, kie estas kelkaj stratetoj konsistantaj el multaj vicoj da domoj, estas bona ekzemplo montranta kiel socia kooperado funkcias en nova Ĉinio. Tiu ĉi domvicaro loĝata de preskaŭ 1000 homoj, antaŭe estis sub la ungegoj de tipaj Kuomintangaj banditoj kaj iliaj murdistoj, kiuj okazigis tumultojn kaj ĉantaĝis monon el la riĉuloj kaj premis la malriĉajn ĝis la tero. Hereditaj de Ĉiang-Kaj-ŝek-a reĝimo, ĉe liberigo, krom ok bordeloj, troviĝis 11 etaj, malhelaj hoteloj, opifumejoj kaj vetludejoj—ĉio ĉi tio servis kiel rendevuejoj por krimuloj kaj Kuomintangaj agentoj.

(daŭrigo sur p. 55)

en Funkciado

Pej Oŭ

Post la kalkulado de la voĉoj, elmontriĝis, de la sekvantaj personoj ricevis la plej multajn voĉojn (de 160 ĝis 180) kaj estis enskribitaj por la subdistrikta elektado: unu antaŭa lerneja instruisto, unu kolegia diplomito laboranta en iu teksta fabriko kaj unu junulo ĵus elirinta el kolegio. Iu knabino mi mem estis la du venkitaj kandidatoj, malsukcesaj je 20-30 voĉoj.

Dua balotado okazis inter la kandidatoj de la 13 stratoj de la subdistrikto. El tio ĉi rezultis la elekto de unu reprezentanto el la subdistrikto, sendata al la distrikta popola konferenco. Reprezentantoj al la tuturba popola konferenco—Suĉoŭ-a plej alta organizo de memregado—estis post elektitaj per baloto el la distriktaj kandidatoj.

El la 400 reprezentantoj al la Kvara Konferenco de Popolaj Reprezentantoj, pli ol du trionoj estis elektitaj por la unua fojo, kaj ili ĉiuj estis gvidantoj nove aperintaj el laborista movado kaj aliaj popolaj organizoj. En la konferenco, interalie, la reprezentantoj ekzamenis buĝeton kaj bilancon de la urba registaro kaj faris proponojn kaj decidojn pri konstruaj projektoj kaj aliaj civitaj plibonigoj. La reprezentantoj ankaŭ esploris la progreson faritan en planoj aprobitaj ĉe la antaŭa konferenco. Krome, ili faris rekomendojn por premioj al publikaj laborantoj kaj korektis difektojn kaj erarojn en la urba administrado per publika demokrata kritikado.

Delegitoj de stratoloĝantoj ĉe Konferenco de Ŝanhajaj Popolaj Reprezentantoj.



Nur Tri Kondiĉoj

Rimarkoj de la Redaktoro: Landskala grandioza kampanjo por plena efektivigo de la Geedziĝa Leĝo okazos en Ĉinio dum marto ĉijare. Por antaŭe aranĝi la aferon, oni jam frue en decembro 1952 fondis, unu post la alia, komitatojn por la kampanjo en diversaj lokoj, kaj organizis labor-grupojn tiucelajn por esplori, ĝis kia grado jam efektiviĝis la Geedziĝa Leĝo en uzinoj, lernejoj, institucioj, ktp. kaj por helpi solvi la problemojn tiurilatajn. La jeno estas unu historio el tia laboro.

La laborgrupo alvenis al la vilaĝo Cejunse (Templo de Favora Nubo), kaj apenaŭ restinte du tagojn en la vilaĝo, ĝi jam vidis, ke la tiea virina movado ne estas en ordo. Matene, k-dino Liu, la ĉefo de la grupo, parolis pri la Geedziĝa Leĝo al iu junulino survoje. Sed tiu lasta, interrompante ŝin, diris: "Pli bone ke vi iru kaj iom klarigu pri la afero al nia DVF-direktorino mem!" kaj tiel dirante, ŝi sin turnis kaj foriris.

La direktorino de la Demokrata Virina Federacio estis Ĉang Siu-ĵing, altkreska juna virino kun grandaj okuloj. Ŝi estis filino de malriĉa kamparana familio. Kiam ŝi estis deksejara, aranĝite de svatistino kaj por la 3 hektolitroj da greno donacitaj al ŝiaj gepatroj, ŝi estis edzinigita al iu loĝanta en vilaĝo 5 kilometrojn for de ŝia familio. Tuj post la geedziĝo, la edzo jam montris ial malŝaton al ŝi. Unu jaron poste, la edzo elmigris malproksimen por laboro. Ekde tiam, ili neniam vidis unu la alian. En la jaro 1950, kiam publikigis la Geedziĝa Leĝo, Siu-ĵing iam meditis en si pri eksedziniĝo, tamen ŝi tion ne eldiris. Sed poste alvenis letero de la edzo, dirante: "Ni eksedziĝu, por ke ni ambaŭ estu liberaj!" Tial, Ĉang Siu-ĵing revenis al la vilaĝo Cejunse kaj vivis en sia gepatra hejmo.

Tiu ĉi 25-jara virino ne nur bonege mastras kudradon, sed, pro ŝi, la kampo de ŝia familio ankaŭ liveris abundan rikolton. La vilaĝanoj ofte diras, "Vere, Ĉang Siu-ĵing egalas al junulo en produktado!" En ĉiaj ajn kunvenoj aŭ agadoj, ŝi, ĉiam kaj senescepte, estas la unua kaj plej vigla. Kaj kiu ja ne scias, ke ŝi estas "aktivulo"! Oni malfermu ŝian etan bluan notolibron kaj rigardu, kiel netaj estas ŝiaj skribaĵoj! kaj, sur ĉiuj paĝoj, kiel bonajn markojn ŝi akiris en la ekzercoj de la vespera lernejo kiun ŝi vizitas! Tia estas Ĉang Siu-ĵing; ĉu oni povus imagi, ke ĉe ŝi efektive ekzistas io ne en ordo?

Post la alveno de la laborgrupo, la virinoj de la tuta vilaĝo ĉiutage studis la Geedziĝan Leĝon kune. Je la tria tago, k-dino Liu diris en la studkunveno: "Hodiaŭ ĉiu el ni ion diru pri si mem, aplikante tion kion ni lernis." Kaj ĉiu el ili, sidante en cirklo sur la brik-lito, rakontis sian historion. Kiam la vico atingis Ĉang Siu-ĵing, ŝi ruĝiĝis kaj kliniĝis, rigardante siajn piedpintojn. Dum longe ŝi povis diri nenion. La aliaj ŝin urĝis, kaj finfine, nur kun granda peno, ŝi eligis la jenan frazon: "Se oni ne edziniĝas, tio ja ne signifas feŭdismon." Vidante ke jam larmoj brilas en ŝiaj okuloj, k-dino Liu ne plu pridemandis.

Tiunokte, k-dino Liu tranoktis kun Siu-ĵing en ŝia hejmo. Liu estis homo sincera kaj naiva; aŭskultante ŝin, oni sentis la elkoran sincerecon de ŝia parolo. Kvankam Ĉang Siu-ĵing estis virino tre silentema, tamen tiuvespere ili babiladis ĝis profunda nokto.

La vilaĝo Cejunse estis fakte nur malgranda vilaĝo. Tie entute troviĝis nur kelkaj dekoj da familioj, kaj ili ĉiuj estis jam amikaj por generacioj; tial, kian opinion tiu aŭ alia havas pri io ajn, ili ĉiuj klare sciis reciproke. Jam frue en sia infanaĝo Siu-ĵing sciis, ke oni malestimas virinojn, kiuj eksedziniĝis aŭ reedziniĝis. Ĉiufoje, kiam la maljunulinoj kaj ŝia patrino en babilado tuŝis tiajn virinojn, ili nepre indigne klaĉis sur la teron, por esprimi sian fortan malestimon. Tujare, filino de la familio Liang, kiu estis fordonita kiel infan-edzino, revenis al siaj gepatroj pro netolebla turmento, kaj poste ŝi reedziniĝis. Pro tio, la bona reputacio de la familio Liang ege ruiniĝis tra la tuta vilaĝo. Pri tio, eĉ la patrino de Siu-ĵing emociis driis: "La Liang-oj estis ĉiuj virtuloj dum tri generacioj, do kiu el ili tiel pekis, ke estis naskita al ili tia malmodesta virino!" Kaj kiam ajn la dirita filino hejmenvenis al la vilaĝo por viziti siajn gepatrojn, ĉiu familio en la vilaĝo fermis al ŝi la pordojn, kvazaŭ tirante, ke ŝi infektos iliajn proprajn filinojn. Tiu virino, kiu "dufoje edziniĝis", estis rigardata kiel pekulo. Nur en tiuj ĉi du lastaj jaroj, la situacio iom ŝanĝiĝis. Oni ne tiel indignis kiel antaŭe, kiam oni tion ĉi priparolis. Sed la pli maljuna generacio ankoraŭ esprimis per kapskuo kaj ĝemspiro, ke ili ne povas senrezerve konsenti pri tia 'nova afero'.

Kiam Ĉang Siu-ĵing hejmenvenis post la eksedziniĝo, la patrino ekploris kaj ĉirkaŭprenis ŝin dirante: "Ho ve, filinjo mia! Kiel mizera via sorto! Vi vivu kune kun mi dum la tuta vivo! Kaj mi vin rigardos kiel filon! La proverbo ja diras: 'Bona virino ne havas duan edzon.' Do neniam edziniĝu denove, tiel ke ni iom retenu la bonan famon...."

Kaj efektive, Ĉang Siu-ĵing kondukis kiel filo. Kaj en laboro kaj en lernado, ŝi tute povis rivali al viro. Sed, ĉiufoje, kiam oni ŝercante diris al ŝi, "Mi trovos por vi amanton", ŝi certe ruĝiĝis ĝis la oreloj kaj respondis, "Bona virino ne havas duan edzon, mi neniam edziniĝos dum la tuta vivo."

Aŭskultinte la rakonton de Ĉang Siu-ĵing, k-dino Liu demandis: "Kiel vi opinias, ekzemple, pri Laŭ Ĉang, kiu eksedziniĝis kun sia infan-edzino, kaj kiu nun denove edziĝis? Ĉu vi lin malestimas?"

“Certe ne.”

“Do kial *vi* ne rajtas havi hejmon por vi mem? ‘Viroj kaj virinoj ja estas egalrajtaj’, ĉu ne?”

“Sed...” Ĉang Siu-ĵing ne daŭrigis sian diron, sed sin turnis kaj silente meditis en si mem.

Kelkajn tagojn poste, okazis en la vilaĝo por la unua fojo “kongreso de gejunuloj”. En la komenco, oni diskutis pri la Geedziĝa Leĝo kaj pri diversaj problemoj rilate al geedziĝo kaj enamiĝo ktp. Sed pli poste la temo iel sin direktis al Ĉang Siu-ĵing. Diversaj opinioj estis esprimitaj de la ĉeestantoj, sed ĉiuj samopiniis pri unu punkto, ke Ĉang Siu-ĵing devas denove edziniĝi. El la tuta ĉeestantaro kiu nombriĝis je sepdek personoj, ja neniu pensis, ke ŝia ideo ke ‘virino ne devas havi duan edzon’ estas laŭdinda virto. Kaj fine, stariĝis la bofratino de Ĉang Siu-ĵing (la fratino de ŝia eksa edzo), kiu lastjare edziniĝis al iu en tiu ĉi sama vilaĝo, dirante: “Bofratino, ne plu ŝanceliĝu pri tio. Pasinte, vi kaj mia frato estis feŭdisme interligitaj de aliuloj, kaj vi vere ne travivis eĉ unu ĝojan tagon en nia hejmo. Sed nun, se vi mem elektos kunulon laŭ via propra volo, kiel povus estiĝi al vi sufero?”

Estis jam malfrue kiam Ĉang Siu-ĵing hejmen venis tiuvespere. Sed la patrino ankoraŭ sidis sur la brik-lito, atendante ŝin. Siu-ĵing diris al sia patrino, “Panjo, se mi ŝanĝus mian decidon, kion vi dirus?” La patrino rapide alparolis: “Filinjo, mi estas atendanta vin por ion diri al vi! Kulpaj ja estas mia malnova cerbo kaj mia malmoderna vidpunkto. Oni prave diras ke malnova digo ne povas bari novan tajdon. Ĉifoje mi vere ekkleriĝas! Vi prudente trovu iun plaĉan al vi kaj edziniĝu!”

La fakto estis, ke tiujn ĉi du tagojn la patrino ankaŭ multe interparolis kun la kamaradoj de la laborgrupo, kaj krome, ĝuste tiuvespere la patrino ĵus revenis hejmen de la “kunveno de patrinoj”. En la komenco de la kunveno, ĉiuj samopiniis kiel la patrino de Siu-ĵing. Tamen, iom poste, ĵu pli oni diskutadis, des pli oni sentis en la afero ion erara. Kaj finfine, kiam oni faris konkludon, ĉiuj jam unuvoĉe diris: “Patrino de Siu-ĵing, vi eraras. Rapidu hejmen kaj klarigu al via filino pri la afero!”

En la dua diskuto-kunveno, Ĉang Siu-ĵing la unua stariĝis kaj ekparolis. Ŝi memkritikis pri sia feŭdisma ideologio, kaj samtempe ŝi ĵuris ke ŝi nepre korektos sian eraron, kaj ke, kiel direktorino de la Demokrata Virina Federacio, ŝi devas multe klopodi por helpi la fratino-virinojn sin liberigi de la malfeliĉa geedzeco. Finante la paroladon, ŝi diris, ruĝiĝante: “Gekamaradoj, mi decidis denove edziniĝi. La kriterio laŭ kio mi elektos mian kunulon estas nur *tri kondiĉoj*, nome, bona laborado, bona lernado, kaj progresiva pensmaniero.” La gejunuloj arde manklakadis plenajn kvin minutojn.

La tagon kiam la laborgrupo por la Geedziĝa Leĝo devis foriri, k-dino Liu, kun pakajo surdorse, volis viziti Ĉang Siu-ĵing por ‘adiaŭi’. Ŝi ĵus alvenis al la



“Sed” Ĉang Siu-ĵing ne daŭrigis sian diron, sed sin turnis kaj silente meditis en si mem.

pordo, kiam ŝi aŭdis knabinan voĉon: “Miaopinie, tiu homo ja kontentigas la tri kondiĉojn.” K-dino Liu direktis sian rigardon antaŭen, kaj—, jen iris Ĉang Siu-ĵing kune kun Vang Ĉung, la milickapitano, babilante kaj ridetante, survoje al la popola lernejo.

—Trad. Ju Fukango—

Demokratio en Funkciado

(daŭrigo de p. 53)

Hodiaŭ tiu ĉi domvicaro havas tute novan aspekton. La prostituitinoj estis senditaj al la speciala trejna lernejo por lerni metion. La loĝantoj havas ok studgrupojn, 16 klerigajn klasojn kaj kvin popolservajn grupojn.

Antaŭe 60 mizeraj familioj, plejparte laboristoj kaj etaj vendistoj, estis dense loĝantaj en la malpura kaj kota vojeto sur Ĉongmi-strato. Pro la disfalinta kloaka sistemo, ili estis konstante minacataj de infektaj malsanoj. En junio, 1951, la strata komitato kaj grupoj de loĝantoj organizis la loĝantojn purigi siajn hejmojn kaj poste helpis ripari la delonge neglektitan kloakan sistemon kaj kotan vojeton.

Dum la tuturba patriota higiena movado, kiu komenciĝis frue en junio de lasta jaro, miloj da organizitaj geviroj rondiris la urbon urgante la loĝantaron partopreni en la movado. En efektiveco, miloj da malfermaj fosaĵoj kaj kloakoj estis purigitaj kaj malaperis la bredejoj por moskitoj kaj muŝoj.

Tiele en mia strato sola, tunoj da forĵetaĵoj kaj ruboj estis forigitaj, du mortaj lagetoj estis ebenigitaj, kaj en nia korto, amaso da rompitaĵoj kaj tegoloj sufiĉis por enplenigi du malprofundajn kaj malpurajn putojn. Oni taksis la tutan kvanton da senutilaĵoj, forportita per ŝarĝaŭtoj el la urbo, je kelkaj miloj da tunoj, ĉar Suĉoŭ ja havis grandan akumuladon da forĵetaĵoj kaj ruboj postlasitaj de pli ol 10 jaroj de nenion-farado de la japanoj kaj Kuomintangareĝimo!

—Trad. Zensto—



Laboristaj loĝejoj de la Ĉekianga Jutoteksejo

La sekvintan tagon post la komenco de la konkurado, ĉiuj 159 grupetoj de la tuta fabriko akceptis la defion de la grupeto estrata de Jaŭ Mejze. La Jaŭ-mejze-grupeto fariĝis glora flago en la tuta fabriko.

La respondoj al la defio estas ĉiuj nete skribitaj sur helruĝa papero. Ili estas gluitaj unu apud la alia laŭlonge de la irejo, kun tuta longeco de 250 metroj, kondukanta de la galerio de la sindikato ĝis la river-transirejo kiu troviĝas ekster la malantaŭa pordego de la fabriko. La laboristoj, kiuj iras al la manĝejo, kaj rigardas kaj babiladas dum irado. Ili sentas ke la promesoj por la konkurado de ĉiuj grupetoj estas pli kaj pli konkretaj unu ol alia, tamen, post zorga pripenso, oni vidas ke ili estas ĉiuj tre bonaj. Sur tiuj ruĝaj paperoj estas pli ol kvar mil subskriboj faritaj per propraj manoj; ĉiuj ĉi nomoj sur la ruĝaj paperoj fariĝis reciprokaj instigiloj inter la laboristoj en la tuta fabriko.

La sonorado de sonorilo por manĝo rapidigas ĉies paŝojn.

La gelaboristoj alvenantaj laŭ kvar vojoj el diversaj laborejoj subite plenigas la grandegan manĝejon. Ili trovas ke sur la tabloj estas kvar pladoj da manĝaĵoj.

“Nu! la manĝaĵoj estas vere tre bonaj tiujn ĉi lastajn tagojn. Du manĝaĵoj el viando, du el legomo. Verdire, ses personoj ne povas elmanĝi ilin.” Onklino Ĉang diris kun rideto.

“Tion akiris por ni la sindikato!” diras Vu Mej-ling, “Ili batalis kontraŭ la kapitalistoj dum dek tagoj!”

“Gekamaradoj!” Ekaŭdiĝas la laŭtparolilo en la manĝejo, “Nun mi sciigas vin pri kelkaj aferoj, volu aŭskulti atente: Unue, la gekamaradoj de manĝeja grupeto ankaŭ faris kontrakton por akcepti la defion. Ili garantias ke la manĝaĵoj estos higienaj kaj bongustaj, kaj ekde hodiaŭ ili aldonas kaĉon el rizo kaj fazeolo. Tiu, kiu ŝatas kaĉon, vole prenu ĝin ĉe la kvara servotablo...”

Skizo pri


la Vivo de

Haŭ Tang

“Ho, troviĝas fazeola kaĉo, ĝin prenu!...” Ĝojkrias multaj.

“Due,” la laŭtparolilo daŭrigas, “la vartistinoj en la infanvartejo faris ankaŭ kontrakton por ke la patrinoj povu senzorge labori; ne lasi la infanojn kun malsekaj koksoj, ŝanĝi urintukon tuj post kiam ĝi estas malsekigita; ne lasi la infanojn longe plori, ilin multe teni en brakumo, kaj multe ilin ridigi; plie doni ĉiutage al la infanoj plian fojon da nutraĵo, lakto, ovo, aŭ legoma kaĉo; garantii ke la infanoj plipeziĝos tagon post tago; ekzameni la temperaturon de

la infanoj kaj trovinte ĝin iom nenormala, tuj sendi ilin al la kuracisto.” Bofratino Liu aŭskultas kun



Grandega Ŝtalprema

—Unu el la tri grandaj konstruoj

Aj Ĉe

En la dua jarduono ĉijare aperos granda ŝtalprema fabriko en Anŝan—la ŝtalurbo de Ĉinio, en Nord-orienta Ĉinio.

El la granda kvanto da ŝtalgrudaĵo produktita de la Anŝan-a Fera-ŝtala Kompanio, tiu ĉi fabriko fabrikos la grandajn ŝtalaĵojn necesajn por konstrui fervojan ponton kaj ĉian alian gigantan konstruaĵon: relojn, diversformajn ŝtaltrabojn kaj ŝtalaĵon por senfenda ŝtaltubo, k.t.p.. Dum la pasintaj jaroj la provizo de tiaj grandaj ŝtalaĵoj necesaj por moderna industria konstruado en Ĉinio tute dependis de importado. Ĉar dum la longdaŭra regado de la Ĉiang Kaj-ŝek-a banditaro, eĉ unu tia fabriko ne estis konstruita. Antaŭe, la ŝtal-jarprodukto de la granda Anŝan-a ŝtalprema fabriko konstruita de Japanio estis nur iomete pli ol cent mil tunoj. Por aĉeti ŝtalmaterialon de fremdaj landoj, la ĉina popolo estis devigata elspezi milionojn da tunoj da grenoj aŭ aliaj materialoj ĉiujare. Tio ne nur pezis la ŝarĝon de la ĉina popolo, sed samtempe ankaŭ severe malhelpis la industrian disvolvon kaj la ekonomian sendependecon. Tial la ŝanĝo de tiu ĉi situacio kaj la konstruado de nova ŝtalprema fabriko estas grava tasko de la ĉina popolo post la liberiĝo. Alie, ni ne povos facile konstrui nian industrion.

Laboristinoj

en la Privata Fabriko

atento. Ĉirkaŭrigardante, ŝi vidas ke multaj fratinoj aŭskultas kiel ŝi mem, kun manĝbastonetoj senmovaj en la mano kaj rideto sur la vizaĝo.

“Trie,” la laŭtparolilo ankoraŭ daŭrigas, “la kuracista grupeto faris ankaŭ promeson por la akcepto de la defio. Ili elpensis specialan labormanieron, pli konvenan por la produktado: ĉiu-antaŭtagmeze de la naŭa ĝis la dek-unua, posttagmeze de la dua ĝis la kvar, ili venas al la laborejoj por kuraci la malsanetojn de gekamaradoj, tiel ke oni ne plu bezonas iri al la kuracejo kaj elspezi senutile longan tempon. Tio komenciĝos morgaŭ matene! Tio komenciĝos morgaŭ matene! Atentu ĉiuj! Atentu ĉiuj!”

Tuj post la informado de la laŭtparolilo, eksplodas bruaj parolvoĉoj kaj ridoj.

Onklino Ĉang estas tiel ĝoja ke ŝi manĝis unu pelvon da kaĉo pli ol kutime. Kaj ŝi ŝerce diras al Bofratino

Liu sidanta ĉe la sama tablo: “Bofratino Liu, vi povas plu naski kun via viro kelke da infanoj, vi ne bezonas timi mizeron pro la naskoj!”

“Ha...kaj vi?” dirante Bofratino Liu ekridas kaj ŝprucigas el la buŝo rizgrajnojn. Tio kaŭzas multajn ridegi nesindeteneble.

“Nu! mi diru la veron, fratineto Mej-ling, trovu amanton senprokraste, la etulo estos tre interesa kaj neniam ĝenanta.”

“Fi, fi, fi, fi!” ege ruĝiĝis Vu Mej-ling, ĵetante al Bofratino Liu kaj Onklino Ĉang straban rigardon, ŝi ne plu manĝas la kaĉon, kaj ekforkuras kun la manĝiloj pro hontemo.

Post la manĝo oni disiras unu post la alia. La laŭtparolilo disaŭdigas la ĉiam ŝatatan kanton: “He! ni laboristoj estas fortaj. He! ni laboristoj estas fortaj!...”

Ĉiuj akompanante al la disaŭdigo, ĥore kantas: “Ni la mondon rekonstruas en alian formon! Ehe! la maŝinoj bruas hulonlon...”

La kanto flugas diversflanken. Ĉiuj iras al siaj propraj postenoj. Post momento la maŝinoj ekbruegas kiel tajdo....

—Elĉinigiĝis Honĉo—

Fabriko en Konstruado


de la Anŝan-a Fera-ŝtala Kompanio—

kaj Ĉang Kung

Laŭ projekto, kiam la ŝtalprema fabriko estos finkonstruita, ĝi produktos pezan kaj malpezan relojn kaj ŝtalajojn en ĉia formo. La jarprodukto de reloj atingos la kvanton sufiĉan por fervojo de Ĉangĉun ĝis Kantono. La jarprodukto de diversformaj ŝtalajoj atingos tiom, ke oni povas konstrui dek kvar gigantajn modernajn ŝtalpremajn fabrikojn kia la nun konstruata kaj krome, ĝi produktos dekmilojn da tunoj da ŝtalmaterialo por senfenda ŝtaltubo. La tuta jarprodukto de tiu ĉi fabriko superos la plej altan jarprodukton de ĉiuspecaj ŝtalmaterialoj de la antaŭa Anŝan-a ŝtalfabriko konstruita de la japana agresanto. Sed la bezonataj laboristoj nombriĝos nur je duono de tiuj de la malnova ŝtalprema fabriko ĉe Anŝan. Tio signifas, ke la niveloj de mekanikiĝo kaj aŭtomatiĝo kaj la produkta kapableco alte superos tiujn de la malnova.

Do, kiom granda estas la konstruo de tiu ĉi fabriko? Tiu ĉi demando estas nefacile tuj respondebla. Ekzemple, unu betona maŝinbazo egalas en areo al unu duetaĝa

Instalado de 35-tuna maŝinparto en unu el la konstruataj ŝtalfabrikoj ĉe Anŝan



Ekspluatado de la Naturaj Riĉfontoj en Nordokcidenta Ĉinio

El la malproksima nefruktodona, neekspluatita vastaĵo, kio ĝi estis antaŭ kelkaj jaroj, Nordokcidenta Ĉinio estas rapide ŝanĝiganta en unu el la plej prosperaj regionoj en tiu ĉi lando. Nun nur tri jarojn post la liberiĝo de Ĉinio, ĝia aspekto jam transformiĝis en multaj rilatoj.

Je la 1-a de oktobro, 1952, la Lanĉou-Tiensuj-a linio malfermiĝis por trafiko. Tiu ĉi estas unu el la plej grandaj kontribuantaj faktoroj, kiuj akcelas la industriigon de tiu ĉi regiono kaj la konsekvenca plialtigon de vivnivelo de la tiea popolo.

Dezertoj kaj ebenaĵoj, kiuj formas grandan parton de la Nordokcidento, ŝanĝiĝos en sukplenan verdejon en la proksima estonteco, ĉar la planoj por investi trioble pli da mono ol lastjare estas nun en plenumado.

Antaŭe, multe da tero estis neglektata kaj forlasita kiel senfrukta, sed esplora laboro en la lastaj tri jaroj provis ke la tero estas kulturebla. Fakte, pli ol 8,500,000 hektaroj da grundo, kiuj egalas al la nuntempe kulturata areo de la regiono, troviĝas kultureblaj.

Oni estas farantaj la preparan laboron por establi grandajn ŝtatajn mekanikigitajn farmojn en la diversaj nordokcidentaj provincoj, unu traktoro-stacion en Ŝensi kaj unu grandan farmaŝinriparan centron en Ninŝia. Tiuj ĉi farmoj provizas krudajn materialojn, grenojn, fruktojn kaj viandojn por la urboj. La ekzistantaj mekanikigitaj farmoj estos plibonigitaj.

Akvoprovizo estos ekspluatata pli grandskale ol antaŭe. En Sinkiang-provinco sole, per plibonigo en akvoutiligo oni povas irigacii aliajn 500,000 hektarojn da seka tero.

Vastaj areoj de lando taŭgaj por forstigado kaj la ekzistanta lignoproduktejo jam estas esploritaj. Ĉijare arboj estos plantitaj sur pli ol 63,000 hektaroj da tero, ĉirkaŭ unu kaj duonan oblojn pli granda ol la tuta areo forstigita en tiu ĉi regiono dum la pasintaj tri jaroj. Antaŭeco estos donita al forstigo por malebligi la senpluvecon en la supra valo kaj la inundon en la mal-supra valo de la Flava Rivero.

Tradukis V. S. Ho.

Grandega ŝtalprema Fabriko . . .

(daŭrigo de p. 57)

domego de kvardek ĉambroj po dudek centiaroj. La kvanto de la bezonata betono, ŝtalaĵoj kaj lignaĵoj de tiu ĉi konstruaĵo superas tiun de la bezonataj materialoj de unu unuaklasa kvinetaĝa domego de ok mil centiaroj. Tamen tio nur estas la bazkonstruo de la tuto. La betono, ŝtalaĵoj kaj lignaĵoj necesaj por la tuta konstruaĵo sufiĉas por ŝarĝi almenaŭ dek ok mil ŝarĝaŭtojn kvintunajn. Kaj la maŝinekipaĵoj estas ankoraŭ pli grandiozaj. Nur parto de ŝtalprema maŝino jam pezas 30 tunojn kaj la bazaj ŝraŭboj de unu maŝino pezas 1.8 tunojn. Por aliksi tiujn ĉi akcesoraĵojn oni uzas maŝinojn. Alie ili estus nemoveblaj.

La bezonata tekniko en tiu ĉi konstruado ampleksas preskaŭ ĉiujn teknikajn sukcesojn en la ŝtalprema industrio de nia epoko. Ke la maŝino pezanta je pli ol dek du mil tunoj devas esti fiksita ekzakte laŭ certa alteco kaj laŭ certa centrolinio; ke tiuj ĉi maŝinoj devas esti instalitaj en tia precizeco ke eĉ la plej eta eraro de duonharo ne estas tolerebla; ke la tuta projektado de tiu ĉi konstruado bezonas ekstreme kompleksan teknikon—ĉion ĉi tion ni lasu flanken. Ni nur menciui la fakton, ke la elektado sola de la loko de la fabriko prenis unu jaron. Dum la elektado de la sidloko de la fabriko, oni devis analizi ĉirkaŭ 400 specojn de tero. La procedo de la exploreksperimento multe dependas de la helpo de la Sovetiaj kamaradoj, ĉar nuntempe ni mem ankoraŭ ne kapablas fari la tuton de tiu ĉi laboro. Certe, kompare kun la komplikaj teknikoj necesaj por la tuta projekto, la bezonata

tekniko en tiu ĉi laboro ankoraŭ estas malpli komplika.

Konsiderante la gigantecon de tiu ĉi granda ŝtalprema fabriko, oni kredeble pensas, ke ĝi nepre bezonos milojn da laborantoj por ĝin irigi. Sed fakte, por produktado sufiĉos ses cent kvardek laborantoj inkluzive de okdek ses administrantoj, teknikistoj kaj servantoj. Dum la produktado la laboristoj ne bezonos iri tien kaj reen, kaj tute ne ekzistos peniga manipulado. Ili nur dise sidos sur pli ol sesdek direktlokoj, rigardante la maŝinon kaj tuŝante la elektro-butonojn aŭ direktante diversajn mekanikaĵojn, dume el la forno aŭtomate eliros la pezanta je 1.5 tunoj ŝtalaĵo, kiu, tra diversaj komplikaj procedoj, fariĝos la bezonataj produktaj. Eĉ la oleado de maŝinoj kaj la fermado kaj malfermado de pordoj kaj fenestroj estas aŭtomataj kaj mekanikigitaj.

Tio ja estas la unua fojo ke ni okupiĝas pri konstruado de tia granda skalo kaj komplika tekniko. Sed sub la genia gvidado de Prezidanto Maŭ; per la granda helpo donata de la Sovetia popolo; kaj per la diligenta klopodo de la miloj da laboristoj de Anŝan, tiu ĉi konstruado estas iranta je senprecedenca rapideco. Post la unua de aŭgusto, 1952, kiam komenciĝis tiu konstruado, kaj en tekniko kaj en provizado de materialoj, ni renkontis multajn malfacilojn, kiuj ŝajnis nevenkeblaj. Ĝis novembro, 1952, ni ne nur venkis ilin, sed ni jam plenumis pli ol duonon de la tuta konstruado. Nuntempe la tuta laborantaro de tiu konstruado energie laboras por ke la fabriko povu ekfunkcii en la venonta duonjaro.

— Esperantigis Nelsono Ĉang —

Prezidanto Maŭ Ze-tung malfermas la sesion.

De maldekstre: Vicprezidantoj de la Konstanta Komitato Ĉou En-laj, Li Ki-ŝen, Prezidanto Maŭ Ze-tung, Vicprezidantoj Ĉen Ŝu-tung, Kuo Mo-ĵo kaj Ĝenerala Sekretario Li Vej-han.



Prezidanto Maŭ Ze-tung faras siajn rimarkojn je la fermo de sesio.




La Popolaj Rezentantoj en Sesio


La kvara sesio de la Unua Landa Komitato de la Politika Konsiliĝa Konferenco de Ĉina Popolo okazis de la 4a ĝis la 7a de februaro. Inter aliaj agadoj la sesio aprobis la Politikan Raporton de Vicprezidanto Ĉou En-laj kaj la raporton de Vicprezidanto Kuo Mo-ĵo pri la Monda Popola Kongreso por Paco.

La sesio voĉdonas. En la fronta vico (de dekstre): Ĉu Teh, Liu Ŝaŭ-ĉi kaj Sung Ĉing-ling.





Čang Zaj-kun, traktoristino de Ĉiusan-a Mekanikigita Ŝtata Farmo de Nord-orienta Ĉinio fama pro sia rekordo rikolti 29 tunojn da tritiko po tago.



Direktoro Hung Ĉe de la ŝtata Ŝanhaja Tabako-Kompanio kaj Prezidanto Tung Ĉe-ŝiang de la fabrika sindikato kune inspektas laborejajn kondiĉojn.



Junulinoj de nova Ĉinio marŝas "fendu Pacon!" ĉe unu el la grandaj en Ĥi



Per la helpo de la Komunista Partio kaj la sindikato, tiuj ĉi du Mukden-aj knabinoj fariĝis spertaj veldistoj post trimonata trejnado sur nova konstruejo.

VIRINOJ DE

Surpostenigis
Vicoj de Paco




Ĝis antaŭen sub la slogano: "Demandiozaj naci-festaj demonstracioj Pekino."

Cuej Ŝu-feng (maldekstre) estis promociita antaŭ nelonge ĉefkontisto de la Harbin-a Fervojestacio post ricevo de kvin premioj pro elstara laboro.




Tiuj ĉi knabinoj en la Departemento de Elektra Inĝenierado de Cinghua - Universitato, Pekino, havas nenian zorgon pri 'laborakiro' post gradiĝo en popola Ĉinio komencanta landskalan laŭplanan konstruadon.




NOVA ĈINIO

en la Frontaj
Landkonstruado

La bezono de medicinaj laborantinoj estas senĉese kreskanta por fondi ĉiam pli grandan nombron da higienaj centroj por patrinoj kaj infanoj kiel tiu ĉi en Pekino.





Abunda Rikolto

Novjara Pentraĵo de Teng Ŝu

“Universitato de Fuoze-monto”

Maŭ Fu-kjun kaj Li Jen-ji

La konstruo de la giganta akvokonservejo ĉe Fuoze-monto sur la meza parto de Huaj-rivero estas laboro postulanta pli altgradan teknikon. En la laborkampo la unua fojo kiam arkara akvobarilo el ferbetono konstruiĝas en Ĉinio. Ne nur la homoj kiuj partoprenas ĉi tiun laboron posedas neniom da sperto en tia laboro, sed multaj el ili eĉ neniam vidis arkaran akvobarilon. Tamen, ekde la komenco de la laboro ĉiuj kadroj kaj laboristoj aktive lernas, kaj senĉese plialtigas sian tekniknivelon, tiel ke ili venkis multajn malfacilojn kaj garantias la laŭplanan progreson de la laboro.

En la komenco de la konstrulaboro, gvidantoj de la labordirektejo tuj konsciis la gravecon de serioza lernado, mem iniciatis kaj vigle gvidis la lernadon. Ĉang Jun-feng, la politika komisaro de la Labordirektejo, longtempe sin okupis pri administra laboro, sed nun li diligente legas hidraŭlikajn librojn pri akvokonservado. Al ĵurnalistoj li diris: “Prezidanto Maŭ diris: ‘Tuj aferoj, kiujn ni bone konas, baldaŭ fariĝos ne bezonataj, dum tiuj, kiujn ni ne bone konas, nun sin trudas al ni por esti farataj.’ Post mia partopreno en la laboro, mi ekkomprenas vere la signifon de lia parolo.” Direktanto Vang Hu-ĉeng tre alte taksas la lernadon de la progresaj spertoj de Sovetunio. Ĉiutage ĉi tiu specialisto de akvokonservado nepre elpremas tempon por lerni ruslingvon malgraŭ ĉiama okupiĝo. Li diris ke li ne havas pli altan celon ol legi ruslingvajn librojn. U Ji, vicdirektanto kaj estro de la Inĝeniera Fakoj, estas maljuna inĝeniero kun grizaj hararo kaj barbo. Li diris al multaj laborantoj: “Kamaradoj, estas por ni feliĉo partopreni tiun ĉi laboron. Ni devas rigardi la laborkampon kiel nian ‘universitaton’. En ĉi tiu ‘universitato’ ni peneghe lernu kaj plialtigu nian teknikon.” De tiam, la nomo “Universitato de Fuoze-monto” fariĝas pli kaj pli bone konata.

Pro la iniciato kaj subteno de la gvidantaro, en la laborkampo vaste disvolviĝas alta tajdo de lernado. Teknikaj studgrupoj ĝenerale stariĝis meze de la fundamentaj organizoj de la laboristoj kaj batalant-laborantoj. Inter la laboristoj kaj batalant-laborantoj disvolviĝis la movado de “garantiata instruado kaj garantiata lernado”. Multaj laborbrigadoj starigis sistemon de teknika lernado. Ekzemple, ĉiun lundon, merkredon kaj vendredon la laborbrigado invitas teknikistojn instrui al administraj kaj politikaj laborantoj kaj laboristoj teknikajn lecionojn, klarigante al ili fundamentajn sciojn pri konstrulaboro. En la laborkampo oni povas ofte vidi laboristojn aŭ kadrojn kolektive lerni aŭ studi sian laboron. Ofte tiel viglas ilia diskutado ke ruĝiĝas iliaj vangoj kaj oreloj.

La “Universitato de Fuoze-monto” nun havas pli ol 7,000 laborist-lernantojn. Urĝa estas ilia postulo por lerni, tiel la gvidantaro de la “universitato” tre atentis fruktodonigi la entuziasmon kaj saĝecon de la laboristoj en la lernado. Ekde la komenco de la laboro ĝis



Pumpistoj fervore lernas pri la strukturo de generatoro

nun, pro senĉesaj lernado kaj studado, la laboristoj jam faris pli ol 400 raciajn proponojn kaj kreaĵajn inventojn laŭ unuapaŝa statistiko. Tio ne nur ŝparis por la patrolando pli ol 7,000 milionojn da juanoj, sed pli grave estas ke dank’ al tio solviĝis multaj malfacilaj problemoj.

En la laborkampo de la Fuoze-monta akvokonservejo laboras 16 ekskavatoroj, kiuj ĉiutage bezonas ĉirkaŭ 400 borilojn. Tiaj boriloj estas aĉetitaj el eksterlando, kaj ĉiu kosta ĉirkaŭ 100,000 juanojn. Laŭ malnova praktiko, ĉiu borilo povas esti uzata nur tri aŭ kvar fojojn, kaj poste ĝi fariĝas jam senutilaĵo. Laboristoj Ĉen Li-ŝeng, Ŝe Kuej-fa kaj Ĉung Ĉaj-te interkonsiliĝis: “Se ni transformus la eluzitajn borilojn en uzeblajn, ja ne malmulte da mono ni povus ŝpari por la patrolando!” La teknika studgrupo pridiskutis ilian opinion kaj konsideris ke oni povas fari tiurilate provojn. Tuj ili komencis eksperimenti. Post du monatoj da eksperimentado, finfine ili eltrovis metodon por rebonigi eluzitajn borilojn. Tiel pli ol 10,000 eluzitaj boriloj fariĝis denove utiligeblaj. Tio solvis grandan malfacilon en la laboro kaj ŝparis por la patrolando pli ol naŭcent milionojn da juanoj.

La teknikaj laborantoj, precipe la junaj, de la “Universitato de Fuoze-monto” impete progresas en sia laboro. Ĉu Po-fang el la Komunika Universitato diris: “Mi laboras ĉi tie kiel projektoro. En pasinta tempo kiam mi studis projektadon en universitato, multaj materialoj estis pretaj kaj mi faris nur kalkulojn. Sed ĉi tie oni donis al ni nur topografian

karton, do ĉion alian ni devas plenumi per ni mem. Tial ni ne plu faras surpaperan laboron sed unuigas teorion kun praktiko. Ekzemple en tia komplika laboro kiel la arkara akvobarilo ni lernis dum ni laboris kaj finfine ni finis nian projekton.” Alia juna teknik-laboranto Liu Juan diris: “Mi laboras en la Beton-laboratorio. Ĝis nun ni faris kelkdek detalajn eksperimentojn. Nun ni uzas kelkdek specojn de betono konsistantajn el cemento, sablo kaj ŝtonetoj en malsamaj proporcioj. Tio estas vere tre valora scio, kiun oni ne povas lerni el kia ajn libro. Pri multaj objektoj mi nur legis en libroj, sed kiel ilin fari mi ne sciis. Ekzemple aerizita betono estis malofte uzata, sed nun ni faris eksperimentojn kaj jam uzas ĝin.” Kiel la aliaj laborantoj, la laboristoj ankaŭ faras grandegan progreson. Ekzemple la beton-enverŝado estas tute nova laboro. Pli ol 400 laboristoj de la beton-enverŝa laborbrigado neniam antaŭe ĝin faris nek lernis. Komence neniu povis plenumi tian laboron, sed nun la plimulto jam povas funkciigi la enverŝan maŝinon kaj fariĝis lertaj laboristoj. Originale 80-90 procentoj

de la pli ol 400 laboristoj de la betonbrigado estis tre mallertaj, kaj troviĝis inter ili nur malpli ol dek spertaj kompetentuloj. Sed nun ili jam ellernis la fundamentan teknikon pri betonmiksado. Dum la lasttempa rango-taksado multaj laboristoj de la kvina aŭ sesa rango estis promociitaj ĝis la tria aŭ kvara rango. 70% de la laboristoj de la tuta brigado promociiĝis. En la “Universitato de Fuoze-monto” oni povas lerni pri multaj scioj, kiel akvokonservado, civila inĝenierado, elektra meĥaniko, meĥaniko... kaj popolamasa edukado. En la lernado de ĉiuj scioj observiĝas unu fundamenta principo, t.e., lerni la progresajn spertojn de Sovetunio. En la lernado de progresaj spertoj de Sovetunio, oni jam atingis ĉi tie tre grandajn sukcesojn. Ekzemple, rezulte de la aplikado de Sovetia “rapidega enbora metodo”, la beton-enverŝa brigado plialtigis sian laborefikecon je 100%—150% kaj mallongigis la tempon bezonatan ĝis 50%. Nun ili faras eksperimenton pri la Sovetia “vakua labormetodo” sur la laborkampo.

—Trad. Jang Theing—

Iĉun — Nove Fondita Forsta Urbo

Ŝe Lo

La Malgranda Ŝing’an-montaro en la Nordoriento estas fame konata forsta regiono de Ĉinio. Kvazaŭ senlima maro la densaj arbaroj tiel vaste disetendiĝas ke la popolanoj de la Nordoriento nomas ĉi tiun lokon “arbomaro”.

Iĉun, “haveno” de ĉi tiu arbomaro, estas nove fondita forsta urbo, kiu situas en la centrasuda parto de la Malgranda Ŝing’an-montaro, ĉe la piedo de Inan-monto. Antaŭ ĝi malrapide fluas la Tangvang-rivero.

En la mateno, la ĵus leviĝinta suno hele prilumas la arbomaron. Aroj kaj aroj da blankaj milvoj ŝvebas en la blua ĉielo. La Tangvang-rivero trankvile fluas. Ĉirkaŭate de montoj, arbaroj kaj la rivero, elstaras kelkdek abrikotflavaj kaj ruĝaj domoj pluretaĝaj. La kvar altaj kamentuboj jam komencis fumi. La bruado de maŝinoj en la fabrikoj sonas harmonie kun la tintado de fora arbohakado. De tempo al tempo ankaŭ aŭdiĝas fajfoj de lokomotivoj. Vagonaroj plene ŝarĝitaj de diversaj specoj de ligno bezonata en konstruado—reltraboj, ligno por ŝipoj, telegrafostangoj, traboj kaj fostoj de mingalerio, palisoj, tabuloj kaj lignokuboj—trapasas la arbomaron por ilin transporti eksteren kaj de ekstere enportas diversajn artiklojn necesajn por produktado kaj vivtenado—maŝinojn, aŭtomobilojn, nutraĵojn, ŝtofon, medikamentojn kaj tiel plu.

Kia bela pentraĵo! Kia vivplena urbo!

* * *

Estas malfacile por vi imagi aspekton ĉi-tiean antaŭ kvar jaroj.

Ĉe la piedo de Inan-monto, inter la sovaĝaj herbaĉoj kreskantaj ĝis la talio de homo, solece staris malalta, kaduka kabano. Ĝi estis la ununura konstruaĵo de Iĉun antaŭ kvar jaroj kiu povis esti rigardata kiel “domo”.

Nun la loĝantaro de la Iĉuna forst-regiono jam nombriĝas pli ol 800.000. Antaŭ kvar jaroj sin trovis

nur kelkdek loĝantoj en la tuta vasta regiono kun radio de ĉirkaŭ kvindek lioj. Ili loĝis tre malproksime unuj de la aliaj kaj oni povis trovi najbaron nur post kiam li iris almenaŭ dek kelkajn liojn. Ili estis tiel malintimaj unu al la alia ke ili eĉ ne konis sufiĉe bone la nomojn de siaj najbaroj kaj nur malklare nomis ilin “Maljuna Pan”, “Maljuna Ting”, “Nigra Ĉang”..... Kompreneble tiam ili ne povis vidi la diversajn traktorojn kaj maŝinseĝilojn. Tio kion ili kutime vidis estis kiel tigro kaptas cervon aŭ kiel urso luktas kun tigro.

Kiam la japanaj banditoj estis okupantaj la Nordorionton, tiu ĉi loko estis “senhoma dum tri sezonoj.” Nur en la arbohaka vintro la japanaj rabistoj devigis la perforte venigitajn laboristojn iri al ĉi tiu arbara regiono por haki arbojn por ili. La laboristoj loĝis en kabanaĉoj kaj pasigis sklavan vivon de malsato kaj malvarmo. Intencante nur gajni la plej grandan profiton per la plej malgranda kosto, la japanoj neniom zorgis pri la vivo de la laboristoj. Multaj laboristoj malsatmortis kaj frostmortis en la arbaro aŭ estis premmortigitaj de dehakitaj trunkoj sur ilin falantaj.

La arbarojn same ne zorgis la japanaj rabistoj. Trovinte arbaron de bona ligno, ili forhakis ĉiun arbon senescepte ĝis kalviĝis la monto. En lokoj kie bonaj kaj malbonaj arboj intermikse kreskis, ili forhakis la bonajn kaj postlasis la malbonajn. Ili restigis duonhome altajn stumpojn de la dehakitaj arboj kaj neniam reordigis la arbaran terenon post la hakado. Tial la putra ligno pliputriĝis, produktante grandan kvanton da bakterioj kaj malutilaj insektoj kiuj infektis la nehakitajn arbojn. En la ordinara tempo ili ne sendis eĉ unu gardiston al la arbara regiono. Dum la regado de la pupa reĝimo okazis du fajregoj, kiuj daŭris ĉiufoje pli ol duonjaron kaj kiujn neniu iris estingi. Ĉiuj ĉi tiaj perdoj estas netakseble grandaj.

Nur la Popola Registaro prizorgas la riĉajon de la popolo. Post kiam la popolo transprenis la regpotencon, eĉ arbaroj ankaŭ prenis novan aspekton.

En la aŭtuno de 1947, la Popola Registaro ekspedis la unuan grupon da forstoadministrantoj, vilaĝaj komunistoj, kadroj kaj laboristoj al la forsta regiono. Ili konstruis tie domojn kun ĉirkaŭ cent ĉambroj kaj enloĝiĝis. En 1948, la Popola Registaro mobilizis ĉirkaŭ cent familiojn de Kiamuse por transloĝiĝi en Iĉun por prizorgi la arbarojn. La fervojo inter Nanĵi kaj Iĉun, detruita de japanoj antaŭ ilia kapitulaco, estis ankaŭ rekonstruita. En 1949, stariĝis en Iĉun "Buroo de Forsta Industrio" kaj samjare komenciĝis formale la konstruado de forsta industrio kaj urbo.

Sub la helpo de Sovetiaj specialistoj la Iĉuna forsta regiono enkondukis la progresintajn forstan teknikojn kaj sperton de la socialisma lando.

En la pasinteco, la postlasitaj stumpoj post hakado estis ĝenerale pli ol cent centimetrojn longaj, sed nun la longeco malpliĝis ĝis kvar centimetroj aŭ nulo. La ligno de la branĉoj estis forĵetita antaŭe, sed nun ĝi estas ankaŭ utiligata. En la pasintaj tagoj ĉiu arbo estis segita en kvarmetran, sesmetran aŭ okmetran pecon, sendistinge ĉu ĝi estas bonkvalita aŭ ne. Nun ili estas racie pecigitaj je diversaj taŭgaj longecoj laŭ ilia kvalito, tiamaniere ke granda kvanto da ligno estas ŝparita. En Iĉun estas ankaŭ fondita lignosegejo kiu havas kvar novtipajn maŝinsegilojn kiuj segas ĉiujare pli ol centmil kubmetrojn da ligno por diversaj celoj.

Antaŭe la arbohakado estis tute plenumita per manlaboro, sed nun tio jam estas mekanikizita. La elektra segilo povas trasegi brakumdikan arbon en la daŭro de kelkaj minutoj. La faligita krudligno estis antaŭe tirata de ĉevaloj sur malnovtipaj glitveturiloj kaj ĉiu tia veturilo povis transporti nur kvin kubmetrojn da krudligno ĉiutage. Hodiaŭ la ligno-transportado estas plenumita per transport-traktoroj kaj ĉiu traktoro povas tiri kvarcent kubmetrojn da krudligno. En Iĉun nun troviĝas kelkcent tiuspecaj traktoroj. Ĉiuj distriktoj havas siajn traktor-staciojn kaj traktorremizojn. En la urbo estas ankaŭ starigita riparejo por traktoroj.

Samtempe la laboristoj ankaŭ atentis pri la selektado kaj rezervado de patrinarboj kaj la protektado de junaj arboj. En la forsta regiono estas starigitaj dek unu vartstacioj, el kiuj ĉiu havas pli ol cent laboristojn kiuj faras la laborojn de sarkado, termalfirmigado, reordigado de forsttereno, semado de arbsemoj, kaj kulturado de arbidoj, por ke novaj arboj rapide kresku el la prihakita forsttereno. Tiamaniere la arbaroj fariĝos neniam elĉerpeblaj riĉfontoj.

Por protekti la arbarojn kontraŭ fajrego, enirmalpermeso komenciĝas en la komenco de ĉiu septembro en la Iĉuna forsta regiono. De tiam ĉiuj vojoj kondukantaj al la arbaroj estas gardataj de virinoj kun longaj lancoj. Krome, estas organizita kontraŭfajra brigado kun ĉirkaŭ mil anoj, kiu estas subdividita en pelotonojn, subpelotonojn kaj grupetojn kaj laŭdistrikte respondecas kontraŭfajran taskon. Tage kaj nokte ili gardas siajn arbarojn kontraŭ damaĝo.

* * *

Sekve de la disvolviĝo de la forsta industrio ankaŭ rapide progresas la laboro de urba konstruado en Iĉun. En la daŭro de mallongaj kvar jaroj, de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo, preskaŭ ĉiuj necesaj bezonataj en urbo estas troveblaj ĉi tie. Inter la ŝtataj kaj privataj entreprenoj estas kompanio de nutraĵoj, farunmuelejo, filio de Popola Banko, magazeno, kompanio de lokaj produktaĵoj, kooperativo de funkciuloj kaj laboristoj, hospitaloj, hoteloj, banejoj, ŝuvendejoj k.t.p. Inter la multaj kulturaj kaj edukaj organizoj estas unu mezgrada lernejo kaj dek unu elementaj lernejoj, kie lernas pli ol 2,000 infanoj de laboristoj; unu granda sportejo, kiu povas enteni pli ol dek mil personojn; unu teatro, kiu povas enteni pli ol du mil rigardantojn; kaj unu loĝejo de laboristoj, en kiu povas loĝi kvincent personoj. Krome estas ankaŭ klubo, biblioteko, sanatorio.....



Traktoroj en Transportado de arbo-trunkoj al Iĉun

La urbo de Iĉun ankoraŭ kreskas. Tien venadas ĉiutage multaj homoj ĉu por partopreno en la laboro aŭ por simpla vizito. Ĉiuj hoteloj, gastejoj kaj privataj hejmoj estas homplenaj. Ĉie vidiĝas traboframoj por domkonstruado, sed la nombro de nove konstruitaj domoj neniel povas kontentigi la aktualan bezonon.

La loĝantoj en la urbo nun nombriĝas ĉirkaŭ dudek mil. Ilia vivo estas tre gaja. Ĉiutage kiam la suno malsupreniras, ili eliras el la fabrikoj; kelkaj iras en la banejon por sin bani; kelkaj al la klubo kaj teatro por sin amuzi; kelkaj aliaj al la sportejo por ludi pilkojn aŭ fari diversajn aliajn sportojn; aliaj promenas kantante sub la arboj apud la rivero aŭ legas librojn kaj gazetojn en la biblioteko. La labormodeloj, antaŭirantaj produktantoj kaj tiuj laboristoj kiuj bezonas sanigadon ripozas trankvile kaj komforte en la sanatorio. Plej feliĉaj estas la infanoj de la laboristoj kaj oficejaj funkciuloj, la sanaj kaj viglaj geknaboj diligente lernantaj. Ili prikantas Prezidanton Maŭ. Ili arde amas la novan urbon konstruitan propramane de iliaj gepatroj sub la gvidado de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ. Ili estas la estontaj arbohakistoj kaj forstaj konstruantoj de nova Ĉinio.

—Elĉinigiĝis Nojo Lo—



Por Pli Feliĉa Geedzeco

Laŭ instrukcio donita de Ĉefministro Ĉou En-laj je februaro 1-a, grandskala kampanjo por vaste propagandi pri la Geedziĝa Leĝo kaj por enketi ĝian aplikiĝon okazos dum marto tra tuta Ĉinio. Tamen, oni ne puŝos la kampanjon en tiujn regionojn, kie loĝas la naci-minoritatoj, aŭ kie la agrara reformo ankoraŭ ne plenumiĝis. Speciala atento estos donita al kazoj, en kiuj oni ne sufiĉe observis la Geedziĝan Leĝon, kaj al edukado de la popolamasoj por elradiki la malmodernan feŭdisman pensmanieron kiu estas la radika kaŭzo de plejmultaj malfeliĉaj geedziĝoj.

Prepara laboro por la kampanjo estas energie progresanta. Komitatoj por gvidi la agadojn jam estas fonditaj en diversaj regionoj kaj en tiaj grandaj urboj kiaj Pekino kaj Tienzino. Laborgrupoj estas jam senditaj al multaj gubernioj kaj vilaĝoj por enketi kaj analizi la problemojn kiuj bezonas solvodon. Grandaj kvantoj da broŝuroj, folietoj, afiŝoj kaj aliaj propagandaj materialoj jam estas preparitaj.

Unuaj Ter-mezuristinoj

La unua grupo de ter-mezuristinoj jam prenis sian postenon inter la laboristoj sur la konstruejoj en Nordorienta Ĉinio. La grupo konsistas el 31 junaj virinoj, aĝantaj de 17 ĝis 22, inter kiuj troviĝas kelkaj koreaj virinoj. Ili estas asignitaj labori sub la Projekta Kompanio de la Pez-industria Ministerio.

Plejparto el ili estis gradigitaj el malsuperaj mezlernejoj. Ili montris mirigan rapidecon en ellernado de ter-mezurado kaj desegnado, kaj ili lernis dum kvar monatoj tion, kio ordinare postulas unu jaron. Ili jam kapablas plenumi mezuradon kompare komplikan. Kun granda en-

tuziasmo, ili jam finis la mezuradon de iu fabriko en Nordoriento en du trionoj de la tempdaŭro antaŭe-fiksita.

Granda Antaŭenpaŝo en Produkto de Kemiaĵoj

Granda antaŭenpaŝo estas farata en la produktado de kemiaĵoj en Ŝanhajo. La produkto-kvanto estas 30 oblojn pligranda kompare kun tiu de la tempo antaŭ liberiĝo. Nun produktiĝas 500 specoj da diversaj medicinaĵoj kaj kemiaĵoj, dum antaŭe la tuta sumo estis nur 20 specoj. En ĉiu monato troviĝas konstanta pliiĝo en produkto-kvanto je 10-20 procentoj.

La starigo de esploraj kaj analizaj laboratorioj en fabrikoj estas granda kontribua faktoro en tiu ĉi antaŭenpaŝo. Kreskanta postulo por plej bonkvalitaj medicinaĵoj kaj kemiaĵoj venas de universitatoj, teknikaj lernejoj, hospitaloj kaj industrioj, kaj la laboratorioj estas konstante klopodantaj por plialtigi la normojn de produktaĵoj.

Medicina Edukado en 1953

Inter la planoj por medicina edukado en 1953, la Ministerio de Publika Sano jam decidis, ke altkvalifikita medicina personaro estu speciale trejnita por labovi en fabrikoj, minejoj kaj vilaĝoj.

Pli multaj doktoroj estos trejnitaj kaj mallongdaŭraj specialaj kursoj por alta medicina trejnado estos okazigitaj. La plej grava tasko en duagrada medicina edukado ĉijare estas, kiel antaŭe, la trejnado de kuracisto-helpantoj. Dek dugradaj medicinaj lernejoj estos aldonitaj al la nunaj 300. Pli multaj institutoj kaj kursoj estos fonditaj por la malnovtipaj doktoroj, kiuj nun volas ricevi modernan sciencan trejnadon. Oni taskas je 30,000 la nombron de tiaj doktoroj, kiuj sin registros por tiuj kursoj en 1953.

Novaj Hejmoj por 4,000 Familioj Finkonstruitaj en Ŝanhajo

La konstruado de loĝejoj por pli ol 4,000 familioj en Ŝanhajo, komenca en lasta aŭgusto, nun jam finiĝis. Tio estas parto de la granda projekto por konstrui laboristajn loĝejojn kun plankspaco de 300,000 kvadrataj metroj.

La tuta plano inkluzivas kulturajn centrojn, lernejojn, kooperativojn kaj bazarojn. Kelkaj el ili jam estas finkonstruitaj.

Alta Edukado Servas al Bezonoj de Konstruado

Mezgrada kaj alta teknika edukado en Ŝanhajo estas multe ekspansiigita por plenumi la bezonojn de la lando.

En tiu ĉi semestro, sole en inĝenieraj institutoj, la nombro de studentoj pligrandiĝis je pli ol 2,100 kaj la fakultataj membroj, je 250. La nombro de novaj studentoj en Ĉiaŭtung-kaj Tungĉi-Universitatoj, de tiu ĉi semestro, superis trioble tiun de 1951. En tiuj institutoj estas kelkdek kursoj por la diversaj branĉoj de peza industrio. La ekspansio de domoj kaj ĉiaj oportunaĵoj por mezgrada teknika edukado ebligis 6,800 novajn studentojn sin registri.

En tiu ĉi semestro, domoj okupantaj spacon de 23,000 kvadrataj metroj estis konstruitaj de Tungĉi-Universitato. Kelk mil ĉambroj por studentoj estis ankaŭ konstruitaj de Ĉiaŭtung-Universitato kaj la Kemiinĝeniera Instituto de Orienta Ĉinio. La Ŝanhaja Industria Lernejo estas faranta preparojn por la konstruado de laboratorio por 350 studentoj.

La lernoprogramoj estas pliriĉigitaj per la uzo de Sovetiaj teknikaj libroj. Fakultataj membroj starigis esplorgrupojn por pristudi kaj plibonigi la lernolibrojn kaj instrumentadojn.

Kredit-kooperativoj en Kamparo


Kredit-kooperativoj ludas pli kaj pli gravan rolon en la kamparo, kie nun troviĝas pli ol 8,000 tiaj societoj. Ankoraŭ pli grandaj disvolviĝoj estas antaŭvideblaj, ĉar nun ekzistas ankaŭ pli ol 5,000 malgrandaj interhelpaj kredit-grupoj kaj plejparto de la grandaj kredit-kooperativoj kreskis el tiuj malgrandaj grupoj. Krom tio, ekzistas ankaŭ pli ol 1,000 kredit-sekcioj en la komercaj, konsumaj kaj la provizaj kaj cirkulaj kooperativoj.

La rapida ekspansio de tiu ĉi kampara kredit-sistemo estas la rezulto de la vasta disvolviĝo de organizita agrikulturado. La praktiko de sciencaj agrikulturmetodoj fare de la terkulturistoj estigas bezonon por pli da mono.

Ekzemple, en Ŝansi-provinco, 2,620 kredit-kooperativoj kaj interhelpaj kredit-grupoj lastjare donis pruntojn kiuj ebligis la terkulturistojn aĉeti ĉirkaŭ 14,000 ŝarĝ-brutojn, 490 kampĉarojn, 229 akvo-radojn, 1,228 plugilojn kaj grandan kvanton da insektomortigiloj kaj semoj.

Antaŭ la Tritika Rikolto

—Tan I—



Sceno el la teatraĵo. De maldekstre: Bofratino Li, Cuej Ju-lin, Li Ming-fa

Tempo: antaŭ la tritika rikolto, 1952.

Loko: certa vilaĝo en Sungkiang-provinco.

Personoj:

CUEJ JU-LIN: administranto de agrikultura produktiva kooperativo, tridekkvar-jara.

CUEJ JU-ĈE: fratino de Cuej Ju-lin, dudekunu-jara.

LIU KING-ĈJUAN: ĉeval-flegisto, kvindek-jara.

LI MING-FA: intendanto de la kooperativo, trideksep-jara.

Bofratino LI: edzino de Li Ming-fa, tridek kvin-jara.

Sceno:

La hejmo de la administranto. En la korto. Tri novekonstruitaj ĉambroj kun vitraj fenestroj. La korto estas grandspaca kaj hela. Dekstre, tuĝ apud la korto staras pajlotegmenta kabano, antaŭ kiu troviĝas poplo. Inter la arbo kaj fenestro streĉiĝas ŝnuro uzata por sekigi vestaĵojn. Maldekstre ĉe la antaŭa plano montriĝas kelkaj fostoĵoj. Per tio oni povas scii je ekrigardo, ke tie estas la ĉevalstalo. Ĉe ambaŭ flankoj de la loĝejo troviĝas pasejoj. La maldekstra estas inter la loĝejo kaj la stalo; sur ĝi oni povas vidi la grenkampon kaj malproksiman monton; la dekstra—antaŭ la kabano. Kiam la kurteno leviĝas, Cuej Ju-ĉe sekigas lankovrilon en sunbrilo en la korto.

CUEJ JU-ĈE (ĵetante rigardon al la ĉielo): Pluis nokte, sed sereniĝas tage. Do ne plu pluvu post sereniĝo! (Paŭzetas, glatigante la lankovrilon.) Oni sendos min for posttagmeze, ĉar jen la suno aperas. Ja, kiel aspektas la traktoro?... Ĉu ankaŭ aliaj virinoj iris tien por lerni ĝin konduki? La koro batas tiel forte, mi ne scias, ĉu tio venas de ĝojo aŭ timo. Mi hezitis pri nenio, sed kio okazas

hodiaŭ? (Paŭzeto.) Jes ja, mi neniam forlasis mian hejmon antaŭe...

BOFRATINO LI (envenas kun pesilo): Cuej Ju-ĉe, kion vi sunumas hejme?

CUEJ JU-ĈE (sin turnante): Ho! estas vi, Bofratino Li!

Bofratino Li (alproksimiĝas): Kiel? La lankovrilo tute malsekiĝis!

CUEJ JU-ĈE: Ho jes. Terura estis la dumnokta pluvego.

Bofratino LI: Ĉu via tegmento tralasis pluv-akvon?

CUEJ JU-ĈE: Ne, mia frato ellitiĝis por rigardi la ĉevalojn. Li ŝirmis sin per la lankovrilo kaj ĝi baldaŭ plene malsekiĝis.

Bofratino LI: Vera bravulo estas nia administranto! Li eliris spite al la pluvego ne zorgante ĉu ĝi frostmalsanigos lin. Nu, ĉu li estas hejme?

CUEJ JU-ĈE: Li iris al Frato Li por kune esplori la kreskiĝon de la riverakvo ĉe Suda Marĉo. Kial vi tion ne scias?

Bofratino LI: Mi iris frumatene al la kooperativo por pruntepreni pesilon. Kiel mi povus scii tion!

CUEJ JU-ĈE: Por kio vi prunteprenas la pesilon?

Bofratino LI: Nian legomsemojn... (Ekkonscias pri sia ellaso de sekreto) nu, mi volas pesi miajn du porkidojn por vidi kiom ili kreskis.

CUEJ JU-ĈE: Vi ja estas interesa strangulo, Bofratino Li! Vi amuzas vin hejme per pesado de porkidoj pro nenifarado, dum la aliaj iras esplori la kreskiĝon de la riverakvo!

Bofratino LI: Ĉu ne ankaŭ vi restas hejme?

CUEJ JU-ĈE: Mi? Prave, mi ankaŭ ne iris.

Bofratino LI: Kial ankaŭ vi ne iris? Ho, mi scias, vi ne pesas porkidojn, sed sunumas lankovrilon hejme, hahaha!

CUEJ JU-ĈE: Prave! Vi trafte divenas. Hieraŭ mia frato diris al mi ke la distrikta komisaro sendos min hodiaŭ al la traktora lernejo kaj ordonis min sekigi la lankovrilon por ke posttagmeze mi povu enpaki la litaĵon.

Bofratino LI: Post via klarigo mi ekmemoras, ke dum mi venis tien ĉi, mi renkontis Distrikta Komisararon Sju survoje kaj li diris al mi: "Se vi irus al la domo de la Administranto, diru al Cuej Ju-ĉe ke ŝi venu al mi." Ĉu li ne serĉas vin por preparoli pri via aliĝo al la traktora lernejo?

CUEJ JU-ĈE: Nu, mia frato jam sciigis min hieraŭ, ke Distrikta Komisaro Sju volas paroli kun mi.

Bofratino LI: Do kial vi ankoraŭ ne iras?

CUEJ JU-ĈE: Ĉu virinoj estas kapablaj lerni tiun metion?

Bofratino LI: Aliaj estus nekapablaj sed vi estas escepto. Cetere vi havas jam dudek unu jarojn kaj ne plu estas malgranda knabino. Nun la ĉefo de la familio estas malpermesata aranĝi la geedziĝon de la infanoj laŭ sia arbitro, kaj ĉio dependas de vi mem. Bravulino nepre serĉu bravulon por si. En la urbo...

CUEJ JU-ĈE: Kian sensencaĵon vi parolas, Bofratino Li?

Bofratino LI: Mi diras, ke vi estas malsaĝulino. Oni vin sendas tien ĉar oni estas favora al vi. Alie, kial oni ne sendas min al la lernejo?

CUEJ JU-ĈE: Sed, pripensu, kiel mi povus iri?

Bofratino LI: Trankviliĝu. La vojaĝo kovros ĉirkaŭ tridek li'ojn kaj la vojo estas kotega. Tamen en la Kooperativo ne mankas ĉevaloj. Ĉu estas eble, ke oni lasu vin iri piede?

CUEJ JU-ĈE: Ĉu vi diras ke mi iru surĉevalo?

Bofratino LI: Jes! La vojo estas kotega. Kiel vi povus iri ne surĉevalo? Se vi rajdus sur mia ruĝa ĉevalo al la urbo! Ĝi estas bonega trotanto, sed ne tre obeema kaj ŝatas piedfrapi. Kion fari, se ĝi ĵetus vin sur la teron dumvoje kaj farus vin tute kovrita de koto!

CUEJ JU-ĈE (*eksplozas per rido*): Kiel malproksimen vi erarvagas en via parolo. Bofratino Li! Mi ne diris, ke mi ne povas iri pro la koteco de la vojo, sed volis diri, ke baldaŭ alvenos la tempo de rikolto kaj mi intencas rikolti kune kun la vilaĝanoj.

Bofratino LI: Ha! Se vi dirus, ke oni sopiros vidi vin dum via foresto, tio estus vero. Sed la tritikon oni ja povos rikolti sen via helpo. Ĉu oni ĉesus fari kukon pro la manko de unu ovo?

CUEJ JU-ĈE: En tiu ĉi jaro la tritiko kreskas tiel bone, ke mi volas ĝin rikolti kaj porti hejmen propramane.

Karaj geabonantoj!

Kun granda bedaŭro ni vin informas, ke post klopodado ni devas rezigni la eldonon de *Kalendaro de 1953*. Al ĉiu abonanto ni donacos anstataŭe baldaŭ aperontan novelaron "*La Feliĉo*". Ni esperas ke la ĉ. 140-paĝa broŝuro plaĉos al vi ne malpli ol donaco de kalendaro kaj akiros por ni kompreneman pardonon.

Kun bondeziroj vin salutas

Redakcio de El Popola Ĉinio

Bofratino LI: Sendube ni havos bonan rikolton. Estas sufiĉe ke iuj restus hejme por la laboro! Mi proponas ke vi jam iru. Ankaŭ mi volas viziti la urbon.

CUEJ JU-ĈE (*kun miro*): Vi volas viziti la urbon?

Bofratino LI: Ĝuste por tio mi vizitas vin. Mi volas konsiliĝi kun vi. Ĉu vi bonvolus peti por mi forpermeson ĉe la Administranto?

CUEJ JU-ĈE: Por kio vi iros en la urbon?

Bofratino LI: Mi diras al vi la veron, fratino: min denove atakas la kormalsano. Bona kuracisto ne ekzistas en nia vilaĝo. Oni diras ke kuracisto Jang en la urbo estas eksperto kaj mi volas lin konsulti. Mi loĝos ĉe la onklino de Ŝuanĉjo kaj revenos post sep aŭ ok tagoj maksimume.

CUEJ JU-ĈE: Kiam vi komencis suferi de tiu malsano? Mi ja ne aŭdis tion.

Bofratino LI: Mi ekhavis ĝin jam en mia infaneco, do kiel vi povas scii! En la pasintaj jaroj, mi ne multe ĝin atentis. Sed nun tio estas alia afero. Konsideru, ke nia vivo fariĝas pli feliĉa tagon post tago. Se mi mortus, mi eĉ ne povus vidi vin kondukanta la traktoron post via reveno, jam ne parolu ke mi ne vidos kolhozojn. Mi deziras vivi longe ankoraŭ!

CUEJ JU-ĈE: Ĉu forte doloras?

Bofratino LI: Dum la paŭzo oni ja sentas nenion, sed la doloro estas terura ĉe la atako.

CUEJ JU-ĈE: Kiamaniere?

Bofratino LI (*montrante per gesto*): Estas tiel. Mi sentas doloron en la brusto, kvazaŭ io tordiĝus tie.

CUEJ JU-ĈE: Ne grave, tio estas stomak-malsano. Mi iros kune kun vi post la rikolto. Nun mi donu al vi unue iom da kuracilo.

Bofratino LI (*kun surprizo*): Kio! doni al mi kuracilon?

CUEJ JU-ĈE: Lastjare mia patro malsaniĝis je la stomako kaj pro tio ni aĉetis skatolon da stomaka kuracilo. Li prenis nur duonon de la medikamento kaj resaniĝis. La alia duono restas netuŝita. Mi ĝin donu al vi, sed atendu, mi ne memoras kien oni ĝin formetis!

Bofratino LI: Ne serĉu, Cuej Ju-ĉe, ne serĉu! (*maltrankvile*.)

CUEJ JU-ĈE: Ĝi restas ĉe ni senutila, bonvolu atendi, mi elserĉos por vi. (*Ŝi eniris*.)


Bofratino LI (*murmurante*): Faritajo estas faritajo. Mi jam mensogis kaj devas mensogi ĝis la fino, sed ili neniel malkovru la veran celon de mia vojaĝo: forvendi la legomsemojn. (*Pensante*) Prave, diru al Administranto ke mi iru per mia ruĝa ĉevalo. (*Ŝi iras en la ĉevalstalon. Voĉo malantaŭ la sceno*: "Kie estas mia ĉevalo? Kial ĝi ne troviĝas tie ĉi?" *Envenante*) En la stalo nur mia ĉevalo mankas, certe oni denove pelis ĝin al ia laboro. Ili vidas ke mia ĉevalo estas facile disponebla. (*al la domo*) Cuej Ju-ĉe mia fratino! (*Ekhaltas, memorante ke ŝi iris serĉi la kuracilon*.) Mi irus paroli kun Laŭ Liu la ĉevalisto. Oni ne rajtas laborigi la ĉevalon senripoze. Mi iru lin serĉi! (*Eliras rapide*.)

CUEJ JU-LIN (*Envenas kun Li Ming-fa kaj parolas dum la irado*): La rivera akvo multe kreskis pro

- la dumnokta pluvego. Verŝajne la akvo dronigos viajn du hektarojn da tero. Se tio okazus en la pasinteco kiam ĉiuj laboris nur por si mem, ĉio estus finita.
- LI MING-FA: Jes ja! Sed nun vi ordonis la unuan teamon amasigi teron ĉe la suda ekstremo kaj la duan teamon fari fosaĵon ĉe la okcidenta, ili ne estos subakvigitaj.
- CUEJ JU-LIN: Eĉ se en plej malbona okazo, kiam tiuj du hektaroj estus subakvigitaj, nia kooperativo havas ankoraŭ ĉirkaŭ cent. Jam en tio oni povas vidi la avantaĝon de la kooperativo. Nun lasu ilin labori, ni reiru por paroli pri aliaj aferoj.
- LI MING-FA: Pri kio, Administranto?
- CUEJ JU-LIN: Kia tempo estas nun laŭ via opinio, Ming-fa?
- LI MING-FA: Nu, laŭ mia opinio, ni jam venas al la plej grava momento.
- CUEJ JU-LIN: Jes, la interhelpaj grupoj observas nin suspekteme por vidi kiom da tritiko la kooperativo rikoltos.
- LI MING-FA: La kreskado de ilia tritiko pli malfruas ol nia preskaŭ unu monaton. Ĉu ne estas klare kiel la tago kiu rikoltos pli multe?
- CUEJ JU-LIN: Parolon oni ne kredas antaŭ ol vi portos la rikolton hejmen.
- LI MING-FA: Tiom da entuziasmo regas inter la anoj, kian skrupulon vi havas ankoraŭ pri la rikolto?
- CUEJ JU-LIN: Tion oni devas rigardi duflanke.
- LI MING-FA: Aj, Administranto, mi aŭdis ion kaŝitan en via parolo!
- CUEJ JU-LIN: Jes ja, nun tuj venos la tempo de rikolto, sed iuj el la anoj korpe estas en la kooperativo, dum kore jam forflugis al alia loko.
- LI MING-FA: Kien?
- CUEJ JU-LIN: En la urbon.
- LI MING-FA: Por kio?
- CUEJ JU-LIN: Por aĉeti legomsemojn.
- LI MING-FA: Se ĉiu iros aĉeti legomsemojn, la rikolto estos prokrastita. Kion fari? (Paŭzeto.) Kiu intencas iri al la urbo?
- CUEJ JU-LIN: Kvinĉjo kaj Laŭ Vang jam parolis kun mi, ili mem havas nenion por prisemi sian legomĝardenon kaj la kooperativo posedas ankaŭ ne multe; cetere ĝi intencas plivastigi la prisemotan areon, do rezervi parton de la semoj al siaj anoj estas super ĝia povo. Ĉio tio devigas ilin havigi al si legomsemojn en la urbo.
- LI MING-FA: Ĉu vi permesos ilin iri en la urbon por havigi al si legomsemojn, formetante la laboron de rikoltado?
- CUEJ JU-LIN: Jen la ĉefa punkto! Kion fari laŭ via opinio?
- LI MING-FA: La rikolto ne povas atendi. Laŭ mi, ne donu al ili forpermeson.
- CUEJ JU-LIN: Tamen ankaŭ la alia argumento estas konsiderinda. Ĉiu familio havas sian legomĝardeneton. Ĉu oni povas rigardi indiferece la fakton ke ili havas nenion por ĝin prisemi kaj restos sen legomo en la venonta jaro?
- LI MING-FA (post paŭzeto): Do, Administranto, mi hejmeniros por rigardi; ĉe ni restas ankoraŭ iom da legomsemoj.
- CUEJ JU-LIN: Kiom vi havas?
- LI MING-FA: Tio estas sub la zorgo de mia edzino. Laŭ mia nepreciza kalkulo, entute pli ol dek kvin kilogramojn.
- CUEJ JU-LIN: Lastjare vi kulturis multe da legomo kaj havis abundan rikolton. Se vi povus pruntedoni al ili, la demando estus solvita.
- LI MING-FA: Povas. Kial ne?
- CUEJ JU-LIN: Sed Kvinĉjo diris al mi ke li interparolis pri tio kun via edzino. Ŝi rifuzis kaj puŝis lin el la domo.
- LI MING-FA: Tiu virino estas vera strangulo! Ŝi tenas ĉion en sekreto kaj eĉ ne lasas min scii.
- CUEJ JU-LIN: Jes, via konsento neniel utilis, se ŝi kontraŭstarus.
- LI MING-FA: Se ŝi kontraŭstaros mi ne malŝparos vortojn por ŝin persvadi. Mi faros traserĉon kaj eltrovos ĉion kaŝitan.
- CUEJ JU-LIN: Haha! Sed tio ne estas praktikebla!
- LI MING-FA: Kial ne?
- CUEJ JU-LIN: Vi devas akiri ŝian konsenton per konvinkaj argumentoj. La legomsemoj estos forvenditaj finfine kaj vendante al la samvilaĝanoj oni ne ricevos malpli da mono. Eĉ se ŝi volus vendi laŭ la merkata prezo, tio ankaŭ estas akceptebla. Tiamaniere, ĉiuj povos resti hejme por la rikolto kaj ricevos legomsemojn. Ankaŭ ŝi mem ŝparos la penon forvendi ilin aliloke. Tio ja estos bona por ambaŭ flankoj, ĉu ne?
- LI MING-FA: Trankviliĝu, Administranto, mi garantias akiri de ŝi konsenton per konvinkaj pruvoj.
- CUEJ JU-LIN: Tiel do ĉiaj malfacilaĵoj estos forigitaj kaj la abunda rikolto plene sekurigita.
- LI MING-FA: Jes, ĉu la interhelpaj grupoj ne rigardas per suspektaj okuloj? Venu kompari kun ni, kiu ne konvinkiĝus.
- CUEJ JU-LIN: Ne fanfaronu tro frue, unue mi kalkulu: lastjare nia interhelpa grupo rikoltis po 900 kilogramoj por hektaro, sed laŭ la plano ĉe la fondiĝo de la kooperativo en tiu ĉi jaro ni devas rikolti po 1600 kilogramoj por ĉiu hektaro. La diferenco estos 700 kilogramoj
- LI MING-FA: Vere, eĉ mi ne kredus tion sen mia propra sperto. Ĉu vi memoras? Kiam mi laboris unuope antaŭ du jaroj, mi rikoltis kvindek kvin dekalitrojn da gaŭliang por ĉiu hektaro dum via interhelpa grupo rikoltis cent kvindek kvin. Lastjare la interhelpa grupo rikoltis 900 kilogramojn da tritiko por ĉiu hektaro sed ĉijare la kooperativo povas rikolti 1600. La produktivo senĉese kreskas, kia mirindaĵo!
- CUEJ JU-LIN: Ĉu mirinde?
- LI MING-FA: Verdire nenio estas mirinda en la afero. Jes, laŭ mia opinio, tio dependas de nenio alia ol la sterko.
- CUEJ JU-LIN: Laŭ via parolo, aliaj homoj ne sterkis sian teron?

La Tria Kolombo

—Aj Ĉing—



Pentrita de Picasso por la Tutmonda Popola Kongreso por Paco.

Tra la decembra firmamento
Kolombo flugas el Vieno—
Ĝiajflugiloj rajde sur Espero,
Trembrilantaj je arĝento,
Kvazaŭ neĝblanka plenblovita velo
Pafiĝas super maretendo.

Ĉiam pli alten ĝi flugadas
Kaj ĉiam al la malproksim'.
Supre nubmar' ŝtormo-graveda,
Malsupre ondanta senlim'.

Sen ajna pasporto
Landlimojn ĝi transiras.
Fidela kaj sen laco,
Kuraĝon ĝi inspiras
Al la justuloj en la mondo
Kaj unuigas ilin
Por la defando de 1' Paco.

Tradukis S. J.

LI MING-FA: Tio....

CUEJ JU-LIN: Kio?

LI MING-FA: Mi komprenas.

CUEJ JU-LIN: Kio?

LI MING-FA: Mi komprenas.

CUEJ JU-LIN: Kion vi komprenas?

LI MING-FA (*murmurante*): Interhelpa grupo, kooperativo. Ĉu la nia ne estas kooperativo?

CUEJ JU-LIN: Trafe, la nomo de kooperativo mem jam implicas la plialtigon de la produktivo.

LI MING-FA: Ĉar ĝi havas pli multe da laborantoj kaj pli grandan areon da tero sub sia dispo. Simple per tiuj maŝinoj tirataj de ĉevaloj oni devas rikolti pli multe da greno.

CUEJ JU-LIN: Jes ja! mia Intendanto de la Kooperativo, baldaŭ alvenos la tempo de rikolto ĉu la rikoltmaŝino estas preta?

LI MING-FA (*montrante al li la kabanon*): Mem iru tien por vidi. Hieraŭ oni funkciigis ĝin prove dum longe. Restas hodiaŭ nur iom ĝin frote purigi. Ĝi estas tute preta por la rikolto.

CUEJ JU-LIN (*ridante*): Kia ridindaĵo estus, se la rikoltmaŝino ne funkcius dum la rikolto! Tiukaze

mi faros al vi severan kritikon krom tio ke vi estos eksigita de la anoj.

LI MING-FA: Lastprintempe, kiam ĝi estis alportita, ĝi restis ekstere sen kovro kaj iomete rustiĝis pro la pluvo, alie eĉ la frotpurigo estus senbezona. Tio okazis pro mia kulpo.

CUEJ JU-LIN: Ankaŭ pro mia.

LI MING-FA: Mi estas la intendanto, sed kial vi estas kulpa en tio?

CUEJ JU-LIN: Mi estas la administranto, kiel mi povus esti senkulpa en tio? (*Ili ridas unu al la alia.*)

LI MING-FA (*enpensigante*): Administranto, kiam mi fariĝos intendanto por traktoroj, tiam mi estos kontenta.

CUEJ JU-LIN: Tiu tempo ne malproksimas.

LI MING-FA: Ĉu oni elektos min tiam intendanto por traktoroj?

CUEJ JU-LIN: Mi kredas ke tio estas ebla. Se vi volas, vi estos certe elektita.

LI MING-FA: Sed tio ne estas simpla tasko, (*enpensigante*) por mi la maŝino estas tute fremda.

CUEJ JU-LIN: Ĉu mi ne ĵus diris al vi survoje, ke la distrikta komisaro decidis sendi Cuej Ju-ĉe al la traktora lernejo? Kiam ŝi ellernos la metion, ĉu ni timos ankoraŭ ke ni ne scipovas ĝin manipuli?

LI MING-FA: Jes, Administranto, sendu ŝin tien rapide, ke ŝi ellernu kaj poste instruu al ni. Tio estas ja gravega!

CUEJ JU-LIN: Neniu diris, ke tio estas bagatelo, Intendanto por traktoro.

LI MING-FA (*subite*): Aj, ne ĉiam babilu kaj forgesu la gravan taskon, mi devas iri frotpurigi la rikoltmaŝinon! (*Li intencas foriri.*)

CUEJ JU-LIN: Atendu momenton! Mi diru al vi: dum vi frotpurigas la rikoltmaŝinon, sciigu la kamaradojn ke ili pretigu ankaŭ siajn falĉilojn.

LI MING-FA: Kial, Administranto? Ĉu vi ne fidus al mi?

CUEJ JU-LIN: Tute ne. Konsideru, ke tutan printempon la maŝino kuŝis tie nefunkcia. Se ia embaraso ekozokas dum la rikoltado, ĉu ĉiuj atendu senfare kiam nur unu okupiĝus pri la riparo? Cetere kostos al ili nenion porti kun si la falĉilojn.

LI MING-FA (*kapjesas*): Bone, mi sciigos la kamaradojn ke ili pretigu la falĉilojn.

CUEJ JU-LIN: Nenio devas esti neglektita en laboro, oni devas kalkuli ĉiujn eventualaĵojn.

LI MING-FA (*ridante*): Administranto, pro via parolo mi nepre frotpurigos la maŝinon ĝis unusola makuleto ne restos. (*Li eliras.*)

CUEJ JU-LIN (*rigardante al lia dorso*): Do mi kalkulas je via sukcesa laboro!

CUEJ JU-ĈE (*malantaŭ la sceno*): Trovite, mi trovis ĝin en la fundo de la kesto. Vi certe senpacientiĝas atendente. (*Ŝi envenas kun skatolo de stomakuracilo*) Nun prenu.

CUEJ JU-LIN: Mi prenu (*esplorante la entenon*) stomakuracilon? Mi ne estas malsana, kial vi donas tion ĉi al mi?

CUEJ JU-ĈE: Ho vi revenas, frato. Kiel estas la rivera akvo ĉe Suda Marĉo?

CUEJ JU-LIN: Pri tio ni parolos poste. Ĉu vi vizitis kamaradon Sju, la distriktan komisaron?

CUEJ JU-ĈE: Ankoraŭ ne.

CUEJ JU-LIN: Kial ankoraŭ ne? Oni tuj sendos vin al la urbo posttagmeze.

CUEJ JU-ĈE: Baldaŭ venos la rikolto de la tritiko.

CUEJ JU-LIN: La rikolto ne koncernas vin.

CUEJ JU-ĈE: Ĉu oni ne malkontentiĝos pro tio ke la virina komitatano foriras ĝuste, kiam la rikolto bezonas ĉies laboron?

CUEJ JU-LIN: Tio ne gravas. Jam iru kaj vi ĉion komprenos je via reveno.

CUEJ JU-ĈE: Ĉu ne estus egale se mi aliĝus al la sekvonta kurso?

CUEJ JU-LIN: Kial atendi ĝis la sekvonta fojo?

CUEJ JU-ĈE (*embarasite*): Ĉu estas virinoj inter la partoprenantoj?

CUEJ JU-LIN: Se tie ne troviĝus virinoj, ĉu ne estus pli bone ke vi donu al ili ekzemplon?

CUEJ JU-ĈE: Kial ĝuste mi donu al ili la ekzemplon?

CUEJ JU-LIN: Kiu do? (*Paŭzeto.*) La distrikta komisaro trovas vin sana, legpova, esti partiano kaj tial bone kvalifikita. Oni sendas vin al la traktora lernejo ankaŭ pro tio ke vi laboras bone, estas kapabla kaj ĉiuj ŝatas vin. Sed kion vi volas nun kiam vi estas bezonata?

CUEJ JU-ĈE: Mi.....

CUEJ JU-LIN: Antaŭe vi ja diris, ke vi faros ĉion, kion la kooperativo postulos kaj iros ĉiukaze ĉe la kapo de la amaso.....

CUEJ JU-ĈE: Se mi restus hejme por gvidi la virinojn, mi hezitus pri nenio, sed ĉe la aliĝo al la traktora lernejo, mi jam ne scias kion fari!

CUEJ JU-LIN: La intendanto atendas ke vi lernigu la metion al li je via reveno!

CUEJ JU-ĈE: Mi nepre lernos kiel konduki la traktoron sed kial tiel frue kiam ni ankoraŭ ne povas starigi kolĥozon?

CUEJ JU-LIN: En tiu ĉi jaro ni havas tre riĉan rikolton. Se sekvus ankoraŭ du-tri tiaj rikoltoj, kiu povus antaŭjuĝi, ke ni ne havos la eblecon kuniĝi kun aliaj kooperativoj? Tri-kvar kooperativoj kune havos kelkcent hektarojn da tero, tiam oni nepre bezonos traktoron.

CUEJ JU-ĈE (*enpensige kaj ekmemorante la kuracilon*): Ne, mi preferas iri post la rikolto.

CUEJ JU-LIN: Kial?

CUEJ JU-ĈE: Se mi forirus, aliaj irus ankaŭ. Tiam la rikoltado estus influita.

CUEJ JU-LIN: Kiu ankaŭ volas iri?

CUEJ JU-ĈE (*montrante la stomak-kuracilon al li*): Ĉu vi ne vidas? Mi elserĉis ĝin por Bofratino Li. Ŝi komisiis min peti forpermeson por ŝi, ĉar ŝi intencas iri en la urbon por konsulti kuraciston pri sia stomak-malsano.

CUEJ JU-LIN: Mi neniam aŭdis, ke ŝi havas stomak-malsanon.

CUEJ JU-ĈE: Ankaŭ mi kredas, ke ŝia malsano ne tre gravas. Sed kiam mi mem foriros, mi ne rajtos rifuzi al ŝi la forpermeson.

CUEJ JU-LIN (*ridante*): Kiam ŝi revenos, ŝiaj legomsemoj jam estus malaperintaj.

CUEJ JU-ĈE: Ĉu vi opinias, ke ŝi iras por forvendi la legomsemojn?

CUEJ JU-LIN: Mi ne povas certigi. Eble ŝi malsanetas, sed via forveturo ne devas esti malhelpata de tio.

CUEJ JU-ĈE: Kiu diras, ke mi lasas min malhelpata? Mi ĵus klarigis al vi, ke mi iros post la rikolto. Mi volas vidi la abundan rikolton propraokule.

CUEJ JU-LIN: Vi atentis nur pri la baldaŭ venonta rikolto. Sed rigardu pli malproksimen! Kiam la kolĥozo fondiĝos, ĉu ni povos labori sen traktoro? Kiam ni posedos traktoron, ĉu ĝi povos funkcii sen kondukisto? La feliĉa vivo atendas nin. Se vi estas longvida, viaj piedoj sendube rapidos antaŭen.

CUEJ JU-ĈE: Ĉu tro malfruiĝos iri post la rikolto?

CUEJ JU-LIN: Sed la kurso jam komenciĝos. Ĉu estas eble, ke ĝi prokrastiĝu por vi sola? (*Cuej Ju-ĉe enpensigas senvorte.*) Ne mi devigas vin foriri, tio estas la decido de la distrikta komisaro. Ne forgesu, ke vi estas partiano!

CUEJ JU-ĈE (*post paŭzeto*): Do, mi nepre devas forveturi?

CUEJ JU-LIN: Vi devas forveturi. Iru, mi iros kune kun vi al la distrikta komisaro.

CUEJ JU-ĈE (*montrante al li la kuracilon*): Sed kion fari pri tio? Bofratino Li jam foriris.

CUEJ JU-LIN: Donu al mi, mi transdonos ĝin al ŝi poste. (*Li prenas la skatolon kaj foriras kune kun sia fratino.*) —Trad. S. J.—

Klarigo: 1) Bofratino: ĝenerala salutnomo por virino.

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio
Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 3

E N H A V O

Bildo sur la kovrilo—Junaj geexploristoj pristudas mineralajn ŝtonojn por trovi valoran minon.

Funebro pri Nia Granda Instruisto kaj Plej Estimata kaj Amata Amiko Kamarado J. V. Stalin

La Granda Muro Subtera Demokratio en Funkciado Nur Tri Kondiĉoj

Skizo pri la Vivo de Laboristinoj en Iu Privata Fabriko

Grandega Ŝtalprema Fabriko en Konstruado "Universitato de Fuoze-monto"

Iĉun—Nove Fondita Forsta Urbo

Antaŭ la Tritika Rikolto

La Tria Kolombo

Soj-fabo

SOJ-FABO

La melk-bovino de Ĉinio; la reĝo de ĉiuj faboj; la oro el la tero—ĉiuj tiuj ĉi nomoj estas donitaj al soj-fabo en diversaj tempoj kaj diversaj lokoj. Kaj tamen, neniu el ili kapablas sufiĉe esprimi la multajn utilojn kiujn oni povas tiri el tiu ĉi legumeno.

Soj-fabo originale kreskis en Orient-azio. Oni ĝin kulturis en Ĉinio antaŭ kvin mil jaroj. Sed la Okcidento ekkonis ĝin nur antaŭ malpli ol cent jaroj. La graveco de soj-fabo kaj ĝiaj produktaĵoj akiris altan takson nur dum la elmonro ĉe la Viena Internacia Ekspozicio en 1873. La publiko surpriziĝis pro tio ke soj-fabo povas esti utiligata en tiom da manieroj. En 1908, oni eksportis la unuan kargon de 2,000 tunoj da soj-fabo de Ĉinio al Anglio. Ekde tiam, la kariero de soj-fabo ja estas fenomeno.

Kvankam en Koreio, Japanio, Indonezio, Sovetunio kaj, en la lastaj dudek jaroj, en Usono, oni plantas sukcese soj-fabon, tamen la plej granda produktaĵo restas ankoraŭ en Ĉinio, kies Liaŭ-valo en la Nordoriento kaj la valoj de Jangze kaj la Flava Rivero estas la ĉefaj produktaĵaj regionoj.

Oni semas soj-fabon inter majo kaj junio kaj rikoltas ĝin en septembro kaj oktobro ĉiujare. La ovo-formaj faboj kreskas triope aŭ kvarope en siaj semujoj. La speco flav-kolora estas la plej grava ĉar ili enhavas la plej grandan kvanton da oleo. La nigra, verdeta kaj blanka soj-faboj enhavas malpli da oleo kaj albumino kaj tial ili ne estas tiel ĝenerale kulturataj kiel la flava speco.

Nun, ni nombru kelkajn el la multaj uzoj de soj-fabo.

Unue, ĝi estas tre nutra, grava manĝaĵo pro sia graso- kaj albumino-enhavo, kiu estas multe pli abunda ol tiu de tritiko aŭ rizo. Ĝi estas ankaŭ riĉa je mineraloj—kalio, kalcio, magnezio, natrio, fero, ktp.—kaj vitaminoj A kaj B.

La oleo, elpremita el soj-fabo, povas anstataŭi porkgrason aŭ buteron, kiam ĝi estas speciale preparita kaj solidigita; ĝi estas nutra kaj facile digestebla, kaj estas fakte pli bonkvalita ol la kuir-graso aŭ margarino ĝenerale farita el kotonsem-oleo. Soj-fabo ankaŭ servas al la produktado de salat-oleo, ĉokolado, kakao kaj multaj interne-aplikaj medicinaĵoj.

La dua grava uzo de soj-fabo estas tio, ke ĝi servas kiel besta nutraĵo kaj sterko. La brutoj kaj kortbirdoj tre bone nutriĝas per fabo-kuko (restaĵo de soj-fabo post kiam la oleo estas elpremita). Ĝiaj albumina kaj

mineralaj ingrediencoj pliiĝas la lakto-sekreciacion de bovinoj kaj kaprinoj. Kiel sterko, la soj-fabo en la formo de fabo-kuko estas vaste uzata, ĉar ĝi enhavas fosforon, kalion kaj nitrogenon. En Indonezio kaj Japanio, oni jam grandkvante uzas la de Ĉinio produktitan fabo-kukon kiel sterkon. Ĝi eksportiĝas ankaŭ al Malajo, Birmo, Tajlando kaj aliaj landoj.

Nun ni menciu unu eĉ multe pli gravan uzon de soj-fabo—kaj tio sendube disvastiĝos kun la progreso de tempo kaj eksperimentado—t.e., por industriaj celoj. Ekzemple, pro ĝia elasteco, oni povas fari el soj-faba pulvoro multajn plastikajn produktaĵojn kiaj butonoj, cigared-cindrujoj, cigaredujoj aŭ maŝinpartoj por la teksa industrio. La Ford-kompanio uzas grandan kvanton da soj-fabo en la fabrikado de siaj aŭtomobiloj, 10-15 funtojn por ĉiu aŭto.

El soj-fabo oni povas fabriki gluon. speciale portavol-tabuloj, por anstataŭi sekan gluon. Kvankam ĝi estas malpli glueca ol animala gluo, ĝi estas tamen pli malkara kaj tre taŭga por multaj industriaj celoj, speciale, ekzemple, por paper-fabrikado.

Pro sia graso-enhavo, soj-fabo estas taŭga ingredienco en sapo-fabrikado. El ĝi oni ankaŭ povas fari artefaritan lanon, kiu, intertekste kun kotona fadeno, produktas tre bonan drapon. Plie, ĝi servas kiel anstataŭaĵo por tung-oleo en la fabrikado de lako por vaks-tuko, kaj estas la ingredienco de multaj unĝventoj kaj ŝmirajoj. Ĝi ankaŭ povas esti uzata kiel materialo por eksplodaĵoj kaj glicerino.

Kaj la supra listo ja ne plene mencias la diversajn uzojn de soj-fabo.

Kiom da soj-fabo produktas Ĉinio? En 1931, la produkto-kvanto staris alte je 11 milionoj da tunoj, el kiuj 5,200,000 tunoj estis produktitaj sole de Nordorienta Ĉinio. Sub japana okupado, kaj dum la Rezistmilito kontraŭ Japana Invado, la produkto-kvanto de Ĉinio malpliĝis je 40 procentoj. Post la venko super Japanio, la soj-faba produkto restis malalta sub la reakcia Kuomintanga firegado. Sed de post liberiĝo, dank' al la agrara reformo kaj la restatiĝo de la agrikultura produktado ĉiuloke tra la lando, ciferoj de produkto kaj eksporto jam komencis grimpi returne al sia antaŭa alteco. Nun la produkto de soj-fabo povas plenumi ĉiujn hejmlandajn bezonojn, kaj pli grandaj kvantoj estas haveblaj por eksportado.

—Mallongige trad. Fukang.—